


esperanto

ISSN 0014-0635

ISSN 0014-0635



Vi trovos,

malgraŭ malfrueco, daŭre aktualajn temojn ĉi-numere. Fakte, la enhavo de ĉi tiu revuo malofte dependas de freŝeco por sia efiko: iuj demandoj eternas, kernas en la fenomeno Esperanto, kaj aliaj ampleksas periodojn de jaroj kaj jardekoj prefere ol semajnoj kaj monatoj. De la unua speco ni citu la pledojn sur paĝoj 29-31 por alia gvida filozofio, kies emfazon eĥas la posta aro de faklibraj recenzoj. Kaj de la dua – nu, Afriko, Bjalistoko, Ahrenshoop, Verda Ondo estas aferoj ne de morgaŭa triumfo sed de nuna pacienca penado.

Enhavo

- 21 Regiona agado: Vizito kreas fenestron al afrika Esperantujo (Mark Fettes)
- 22 Mortis ASE, vivu SEU!
- 23 Instruado: Mezaj kaj elementaj ekzamenoj ekster la UK
- 24 Centro Zamenhof: Pri kulturo kaj financoj en Bjalistoko; "Letero el Bjalistoko" (Ewa Siurawska)
- 25 Konferencoj: Malgranda sed reprezenta kunveno pri strategio; La "oni"-diroj de Ahrenshoop (Roland Schnell)
- 26 Infana Kongreseto: Post "kara Roterdamo . . ." (Nima Firuzi, familio So); . . . ĉu vi konas taŭgan infanon? (Christopher Fettes)
- 27 AIS-programo 1989
- 28 Apliko: Verda ondo ruliĝas el Sovetio
- 29 Strategio: La venko estas procedo, ne okazo (Thomas A. Goldman); Ĉu aliaj principoj? (Bertilo Wennergren)
- 31 Esplorvojaĝo tra Azio: Intima, obstina movado en Israelo (Joachim Werdin)
- 32 Recenzoj: *Antaŭ la nova jarmilo – ideoj por la vivo el mondo minacata* de div. aŭtoroj (Wojciech Usakiewicz); *La fenomeno Esperanto* de William Auld (J. Régulo); *En la mirinda mondo de la kino* de Donĉo Ĥitrov (Derek Roff); *La nova paradigmo en psikologio* de Ruben Feldman González (Hans Eichhorn); *Infoduktoj* de Luc De Brabandere (Christian Bertin)
- 35 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 36 Nekrologoj
- 37 Reagoj: Alvokoj por solidareco (José Dolores Gaitán, Stanislav Koncebovski); Prilabori semojn, ne arbojn (Osmo Buller); Ne estis tiel komplike . . . (Gerrit Berveling); Pli bone fuŝe ol forpuŝe (Maurice Bale); Du kazinskaj leteroj pri *baldi* kaj *malbaldi* (Yvars Barŝevski, F. Lo Jacomo); Ĉu vesti aŭ malvesti, tiel staras la demando (Eskil Svane); Vana kverelo (E. A. Haugen)
- 38 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 40 Anoncetoj; Oficiala informilo

La kovrilo

Nur neologismo ŝajnas adekvata por priskribi la lastan Oficejan monaton. Pacienca, kaj mi klarigos ĝin! Al la titola novismo de *Infoduktoj*, libro pri la novaj komunikaj teknologioj (vidu la recenzon sur p. 34), veste ligiĝas nuanc-riĉa silabeto. Laŭ PIV, -oz- povas indiki aŭ malsanon, aŭ ("sub la influo de Ido") la abundecon de konsistiga elemento. Ie en la kombino de la du oni serĉu la kialojn de la ĉi-numera malfruo, kiun forigi strebas la kovrilaj oficistoj.

Malpli enigme: Dum januaro ni enkondukis du novajn aŭtomatig-sistemojn, unu por la revuo kaj unu por la Libroservo. Ekregio de ambaŭ postulis plenajn kvar semajnojn. Supre vi vidas nian kompostiston Roy McCoy lukti per sia Macintosh-mikrokomputilo, kaj unu el ties unuaj produktoj. Malsupre, optimisma mansvingo de Pasquale Zapelli: la tuta stoko de lia Libroservo estas nun registrita komputile, kio liberigos lin kaj volontulojn kiel Lindy Faaij de la temporaba kartoregistrado. Kaj Javier Moleón, ekkompilante la Jarlibron 1989, feliĉas ĉar li ne plu bezonas entajpi librotitolojn. . . . La laborhoroj ŝparotaj per la novaj sistemoj ebligas, unue, re-ĝisdatigon de niaj nunaj servoj, kaj baldaŭ la starigon de novaj. Sed sufiĉu la promesoj – vin konvinku la plenumo!

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakvivilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: + 3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: + 3110 436 1751.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, University of Hartford, West Hartford, CT 06117-0395; tel. (203) 243-4417; telefakso: (203) 243-4070; telekso 9102505313.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg hp. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (36/1) 317 243; telefakso: (36/1) 666 808; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.

Vizito kreas fenestron al afrika Esperantujo

Persona hazardo portis la redaktoron de ESPERANTO al Senegalio dum parto de decembro kaj januaro. Kompreneble li profitis de tiu vizito ankaŭ por kontakti la lokan esperantistaron, verŝajne pli-malpli tipan pri la junaj movadoj de Afriko. Ĉi tiu artikolo celas doni ian bildon pri ties socia fono kaj perspektivoj. Kion signifas Esperanto sur la plej kriza kontinento – por la tieaj movadanoj, por la movado ĝenerale?

Ĉe la plej okcidenta marbordo de Afriko, centon da kilometroj sude de la Verda Kabo, antikva vulkano ĵetis en Atlantikon gigantan fiŝhokon. Tiun lokon la eŭropaj koloniistoj iam faris la plej fifama sklavejo de la mondo: tra Goreo-insulo veturis al amerika servuteco 20 milionoj da homoj tra tri jarcentoj. La afrikanoj nun regas sian landon. Goreo fariĝis monumento al la malhumaneco, deklarita de Unesko “ejo de la monda homara heredaĵo”. Kaj la urbego, kies kvartaloj transrampas la apudan pinton de la hoko, fariĝis la regejo de Senegalio kaj la “pordo de Okcidenta Afriko”: Dakaro.

Miaj kvar semajnoj en tiu lando multe plaĉis al mi, nelaste pro la varma kaj libera socio kiu kreskas tie. Oni ofte nomas Senegalion la sola afrika demokratio. Nu, demokratio estas neabsoluta afero, sed sencenzura gazetaro, deko da politikaj partioj kaj relative alta eduk-nivelo kreis firman bazon por plua progreso.

Kiel ĉie en Afriko, la koloniisma arbitro kunmetis korbon da popoloj kaj dekretis, ke ili kunvivu en unu ŝtato. En Senegalio temas pri deko da etnoj, ĉiu kun la propraj lingvoj kaj kutimoj. Aldoniĝis la mikso de islamo, kiu penetris de la nordo, kaj kristanismo, kiu etendiĝis de la sudo. El la iama franca imperio, britaj imperiistoj elobstinis terfingron, kiu sendependiĝis aparte kaj nomis sin Gambio, tiel distranĉante la sudon de Senegalio disde la nordo. Sed malgraŭ ĉio ĉi, malgraŭ dekkvinjara sekeco finiĝinta antaŭ nur tri jaroj, la lando plu ekzistas, eĉ prosperetas. Oficiale ĝi plu viciĝas inter la tridek plej malriĉaj landoj de la mondo. Tamen la malsato ne plu ekzistas, la misnutro multe malpliĝis, kaj lastatempe imunig-kampanjo faris la landon modelo por la streboj de UNICEF protekti la mondan infanaron. En Senegalio eblas plani kaj esperi.


Nemirige, do, ke ankaŭ en Senegalio naskiĝis movado por la internacia lingvo. Esperanto kaj fidi ja bezonas tiuj pioniraj adeptoj, kiuj plej ofte neniam renkontis eksterlandan esperantiston, maksimume vidis manplenon da gazetoj kaj unu-du librojn. En la komenco ili kutime nutras sin el forta idealismo. Mia dakara gastiganto, Alphonse Diatta, estis unu kiu vidis praviĝi tiun fidon en la somero de 1987: la klopodoj de UEA-komisiito Hans Bakker portis lin kaj dekon da alilandaj aktivuloj al dumonata kursaro kaj kongresaro en Eŭropo. Rezulte, Alphonse sufiĉe flue parolas la lingvon kaj klopodas iom post iom transdoni tiun scion al la dudeko da interesitoj, kiuj konsistigas Dakaran Esperanto-Klubon.

Mi pasigis tri tagojn kun la klubo kaj ricevis tute bonan impreson pri ĝia seriozeco kaj funkcipovo. Plimulto de la anoj estas junaj – pluraj ankoraŭ frekventas gimnazion, unu-du ĵus eniris universitaton, aliaj samaĝaj laboras. Alphonse kaj DEK-sekretario Gabriel Boissy estas la plejaĝuloj, en siaj kvardekaj jaroj, kun teknikaj postenoj ĉe Dakara Universitato. Interese, preskaŭ ĉiuj devenas de Kasamanco – la suda, tropika regiono de Senegalio trans Gambio – kvankam ne ĉiuj de la sama etno. Kiel aliloke en Afriko, ekster la vilaĝoj plurlingveco normas. Alphonse, ekzemple, parolas kiel denaskan lingvon la djolan, trairis lernejon en la franca (la oficiala nacia lingvo – ĉiutaga “interlingvo” de Dakaro kaj ĝenerale de la edukita klaso), studis krome la anglan kaj hispanan, kaj pro praktikaj bezonoj lernis ankaŭ la ŭolofan (la plej parolata indiĝena lingvo kaj la interlingvo de komerco).

Post iom da serĉado, la klubo trovis klasĉambron en la Socia Centro de Faselormo, la kvartalo kie loĝas la plimulto da membroj. Tie ili kunvenas ĉiun sabatan posttagmezon por kelkhora studado kaj ekzercado surbaze de la 22-leciona kurso de Hans Bakker. Kompreneble estas malfacile ekzerci la parolon sen ajna scio, ĉu kaj kiam oni povos utiligi ĝin. Eble tial, malmultaj aŭdacis eldiri pli ol heziteman saluton. “Necesas havi kuraĝon!” mi admonis ilin, pensante pri la ĉinaj spertoj raportitaj en nia januara numero. Kaj efektive, la kuraĝuloj montriĝis tute kapablaj pri la lingvo, eĉ kun bela akcento ne fuŝita de la franca influo....

Pli fruaj spertoj en Afriko iom disvastigis la impreson alilande, ke la tieaj esperantistoj plejparte motivas sin per iluzioj pri mona riĉiĝo. Tial la nunaj movadanoj kiel Alphonse forte malkuraĝigas tiajn revojn. Tiuj, kiuj restas membroj de la klubo kaj daŭrigas studi, estas inteligentaj kaj idealismaj, eble eĉ iom pli ol averaĝe en la movado. Por ili provizore sufiĉas la fakto, ke Esperanto malfermas fenestron al la cetera mondo kaj konkretigas tiun internacian solidarecon, al kiu multaj afrikanoj forte sopiras.

Ilia motiviteco estas ofte impona. Malik Tendeng, ekzemple, laboras dumtage, faras gimnaziajn studojn vespere, sed tamen dediĉas sian sabatan posttagmezon al la lernado de Esperanto – kun tiel bonaj rezultoj, ke dusemajna restado en Esperanta medio farus lin flua parolanto. Aliaj havas financajn zorgojn kaj devas ŝpari por poŝtmarkoj, tamen tenas regulan korespondadon kun po kvar-kvin esperantistoj en Eŭropo, Azio kaj Ameriko. Bakary Marna bedaŭras, ke eblas kunveni nur sabate posttagmeze: “Tio ne sufiĉas por bone lerni la lingvon.” Aliaj, kiel Gabriel Boissy, pli malrapide sin perfektigas, sed flegas la rilatojn kun aŭtoritatoj kaj laboras por diskonigi la lingvon kaj ĝiajn celojn.





Kelkaj klubanoj kaj la vizitanto ariĝas ekster la Socia Centro de Fasdelormo: impona motiviteco.

Iom da tio ni ankaŭ faris. Alphonse kaj Gabriel trenis min al la universitato kie ili laboras, al la nacia radiostacio, al la kultur-kaj eduk-ministerioj, al la urbodomo, al la plej granda landa ĵurnalo, al la nacia Unesko-komisiono. Sadibou Bâ prezentis min al deko da diversnaciaj laborantoj ĉe ENDA, internacia help-organizaĵo bazita en Dakaro, kie ankaŭ li laboras. Ĉie la homoj estis akceptemaj, reagis pozitive. Esperanto por ili tute nature viciĝas inter la aliaj rimedoj, kiujn oni klopodas utiligi por la progresigo de Afriko. La tujaj demandoj ĉie estas: Kion ni povas fari per ĝi? Kiel ĝi helpas nin?

Antaŭ ol iu el ni hastos respondi al tiu demando, decas iom da singardemo. Ni esperantistoj estas novaj alvenintoj en Afriko – malkiel en aliaj partoj de la evoluanta mondo, kie de multaj jardekoj la movadoj ekzistas kaj disvolvas sin. Kaj la afrikaj pioniroj kaj iliaj alilandaj subtenantoj havas multon por lerni. Feliĉe, ne necesas komenci de nulo. Jam ekzistas multegaj internaciaj organizaĵoj, kiuj laboras kaj radikiĝis en Afriko. De kiu ni povus pli bone lerni? Kvankam ĉiuj faris kaj plu faras fuŝojn – apenaŭ ekzistas evoluhelpa organizaĵo, pri kiu la laborantoj kontentas – ne temas tiom pri imito, kiom pri inspiro. Ankaŭ ni proponas realan specon de evoluhelpo. Same kiel aliaj, nia movado povas kontribui al la progresigo de Afriko, ne tiom per nutraĵo por la korpo, kiom per nutraĵo por la menso kaj la spirito. Sed por fari tion je signifa skalo, necesos senprecedencaj investoj de mono, tempo kaj energio.

Aliaj organizaĵoj pretas sendi volontulojn al Afriko por pasigi almenaŭ du jarojn tie, trejnante lokulojn por posta daŭrigo de la laboro. Ni celadu fari same – unue pri instruado de la lingvo, precipe je progresanta kaj perfektiga niveloj, poste pri ĝia utiligo kaj la organizo de la movado. El dakara perspektivo, tio ŝajnas memevidenta afero! El Kanado, el Francio, el Svedio, el Japanio venas fakuloj pri alfabetigo kaj familia sano kaj rizkulturo, plejparte pro elekto laŭ iu interna instinkto de solidareco. Ilin

Mortis ASE, vivu SEU!

Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), unu el la plej imponaj landaj organizaĵoj en la historio de Esperanto, malaperinta en 1938 sub la stalina teroro, vivas denove en Sovetunio. “Perestrojko” (rekonstruo) atingis ankaŭ la Esperanto-movadon.

En konferenco okazinta en Moskvo de la 23-a ĝis la 25-a de januaro 1989, esperantistaj delegitoj el la tuta lando decidis forlasi la ekzistantan Asocion de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) kaj reiri al sia historia pra-organizaĵo. En petskribo al la Konsilio de Ministroj, ili alvokas por rekono de la jura statuso de SEU, atentigante ke tiu organizaĵo neniam estis oficiale malpermesita. Kaj sen atendi, ili jam elektis novan estraron kaj komencis agadi ekster la burokrataj kadroj, kiuj ĝis nun katenis ilin.

Fondita en marto 1979, ASE en sia 10-jara historio neniam sukcesis ekroli kiel pozitiva forto en la sovetia Esperanto-movado. Male, ĝi rapide transformiĝis en efikan bremsilon de la agado, precipe kiel barilo de ĉiaj internaciaj kontaktoj (kun escepto de tiuj kun la socialismaj landoj). UEA multfoje en tiu periodo aliris ASE pri la demando de ties aliĝo al UEA.

Kiam en 1984 tiu aliĝo ŝajnis finfine okazonta, ASE subite ofendiĝis, ĉar en *Esperanto* aperis “insulto al Stalin”, kiun jam antaŭe Ĥruŝĉov kaj poste Gorbaĉov “insultis” multe pli elokvente. Tial, se ASE nun mortis, UEA ne sendos florojn al ĝia tombo.

Vladimir Samodaj, redaktoro de la araba eldono de *Moskvaj novaĵoj*, fariĝis prezidanto de SEU; apud li en la estraro sidas ses vicprezidantoj: Anatolij Gonĉarov, Viktor Aroloviĉ, Sergej Kuznetsov, Anatolij Kozakov (ĉiuj de Moskvo), Boris Kolker (Ufa), kaj Aleksandr Melnikov (Rostov-ĉe-Don). Preskaŭ ĉiuj novaj funkciuloj de SEU estis aktivuloj de la iama neoficiala sed brila Sovetia Esperantista Junulara Movado, kiu agadis de 1965 ĝis 1978.

Jam antaŭ tiu mejloŝtona konferenco, inter septembro kaj decembro 1988, la iamaj filioj de ASE en Estonio, Latvio kaj Litovio ekŝiĝis el ASE kaj refondis siajn memstarajn Esperanto-organizaĵojn. La delegitoj el la tri baltaj respublikoj ĉeestis la konferencon en Moskvo kiel gastoj kaj deklaris ke ili konsideros aliĝon al SEU, “se tio montriĝos sencohava”. Espereble ĝi ja montriĝos tia.

financas registaroj kaj plej diversaj organizaĵoj, parte el propra intereso, sed ankaŭ parte pro tiu sama instinkto. Se ni esperantistoj montros, ke ni estas seriozaj kaj celas praktikan kunlaboron inter Afriko kaj la cetera mondo, oni reciproke traktos nin serioze – kaj iuj registaroj kaj organizaĵoj apogos tiun subtenon per konkreta helpo. Sed necesos esti pli memfidaj – mi dirus eĉ ambiciaj – kaj pli celkonsciaj ol ni estis ĝis nun.

La estrino de la Senegalia Unesko-komisiono rimarkigis al ni: “Alfabetigo kaj edukado en iu ajn lingvo estas valoraj. Ne tiom gravas la naturo de la lingvo, kiom tio kion vi povas instrui per ĝi.” Kaj multilate ŝi pravis. Se en Afriko ni proponos nur alilandajn plum-amikojn, ni kreos esence movadon de plum-amikoj – kaj kvankam tio estas ege valora, eĉ nemalhavebla bazo de nia movado, ni ja kapablas kaj principe celas multon pli. Pri milopo da temoj la inteligenta afrikano povas deziri kaj ne ricevi informojn; la amaskomunikila monopolo estas tie multe pli drasta kaj efika ol en la industria mondo, kie almenaŭ ekzistas alternativoj. Evoluhelpaj organizaĵoj ja komprenas tion. Multaj iliaj klopodoj celas ĝuste informi la popolon pri bazaj kaj esencaj faktoj de la sano, la agrikulturo, la ekologio. Sed la edukaj rimedoj simple ne sufiĉas al la bezonoj, kaj iom devige limiĝas al la plej fundamentaj aferoj.

Esperanto unuavice povas kunlabori en tiu strebo. Ĝia scio kaj uzo ja donas alian perspektivon, kaj motivas homojn al agado kiun ili alikaze ne entreprenus; ĝia relativa facileco, aparte por legado, malaltigas la barilon al senpera akiro de informoj. Sed la dissendo de ĉi-lastaj povas esti same grava. Ĉar evoluigo ne estas nur enlanda strebo: ĝi postulas interesitan, informitan publikon en la pli riĉaj landoj, por krei komprenon kaj subtenon por evoluhelpo. La starigo de afrika esperantistaro grave kontribuos al forigo de la nuna, preskaŭ hontinda nescio pri Afriko ĉe la internacia movado.

Sed tio estas nur la unua ŝtupo en la procezo de komunika emancipiĝo tra Esperanto. Finfine, la povo komuniki senpene kun homoj el centoj da landoj plej malsamaj, la povo trovi tie samfakanojn kaj interŝanĝi informojn kaj ideojn rekte kun ili, povas reprezenti revolucion plivastigon de la mondhorizonto de iu ajn individuo. Kien tio kondukos en Afriko, tion ni ne scias. Sed tiu kontinento, arbitre sekciigita de la koloniistoj, turmentata de klimata ŝanĝo, pene evoluanta sub fremda politika kulturo kiu plej ofte rezultigis militecan diktatorŝtaton, bezonas kiel eble plej da helpiloj por sia propra progresigo. Lingvo estas potenca tia helpilo. Kaj se ni instruos kaj utiligos la nian laŭ ĝiaj meritoj kaj potencialoj ne en iu fora estonteco sed nun, ĉi-semajne, ĉi-jare, ĉi-jardeke, ni faros realan, pri-fierindan kontribuon al la plibonigo de la afrikanara sorto.

Kun malgajo mi adiaŭis Alphonse kaj la aliajn, ne sciante ĉu iam mi havos ŝancon revidi ilin. Mi postlasis por ili aron da libroj kaj kasedoj, instigojn ekzerci la parolon, kaj promeson pluteni la kontakton almenaŭ skribe kaj kasede. Kaj mi diris, espereble ne malprave, ke ja venos aliaj esperantistoj al Dakaro. Tie kaj aliloke, ilin atendas varma bonvenigo kaj – se ili tiel emas – ĝoja laboro.

Mark Fettes

La komisiito por Afriko, Hans Bakker, disponigas konsilojn kaj kontaktojn por la “ĝemel-agado”, kiu fundamentas la afrikan agadon: Kastelenstr. 231-II, 1082 EG Amsterdam, Nederlando. Donacojn dankeme akceptas la Fondaĵo Afriko ĉe UEA. Pagmanieroj troveblas sur p. 40 de la Jarlibro. Raportoj pri aliaj vizitoj kaj vojaĝoj en la landoj de Afriko, Azio kaj Latinameriko ĉiam estas bonvenaj ĉe la redakcio.

INSTRUADO

Mezaj kaj elementaj ekzamenoj ekster la UK

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) transprenis la taskon de UEA organizi internaciajn ekzamenojn nome de ambaŭ organizaĵoj. Nova regularo aprobita de la Komitatoj de ILEI kaj de UEA difinis novan organizan strukturon, kies ĉefa trajto estas la intenco proponi nov-stilajn ekzamenojn diversloke tra la mondo kaj tra la jaro, ne nur aŭguste en la Universala Kongreso de UEA. Disvastigo de tiu intenco atendas la pretigon de libreto nun preparata, kiu prezentos la regularon, postularon kaj specimenajn testojn.

Tamen ni proponas jam du kursojn kaj ekzamensesiojn en Kultura Centro Esperantista (KCE) en la okcident-svisa urbo La Chaux-de-Fonds. Jam okazis la unua, kadre de la jarŝanĝa vintro-skiferiado. La dua okazos de la 3-a ĝis la 8-a de aprilo 1989 sub la gvido de franco François Degoul kaj nov-zelandano Stefan MacGill. En la 6-a kaj 7-a de aprilo ILEI/UEA ofertas la ekzamenon, je elementa kaj meza niveloj. La ekzameno havas antaŭkondiĉan skriban parton, kiu konsistas el gramatikaj ekzercoj. Sukcesintoj rajtos pluiri al la ekzameno mem, kiu havos tri-sekcian skriban parton (por testi legan komprenon, aŭskultan komprenon, kaj kapablon verki eseon) kaj parolan parton (klarigo de bildaro, pritema interparolo, pridemandado pri aspektoj de la Esperanta kulturo, kaj – nur je meza nivelo – klarigo de proverbo aŭ diraĵo). Ekzamenantoj estos tri el inter P. Dubourg, S. MacGill (la sekretario de la ekzamena komisiono de ILEI/UEA), Claude Gacond (direktoro de KCE), kaj Ilona Koutny (instruisto en la interlingvistika fakto de la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto).

La kurso ne estas deviga, oni rajtas alveni nur por la ekzameno mem. La ekzamen-kotizo varias inter 20 kaj 40 SFr. Aldoniĝas al tio la kutimaj restad-kostoj de KCE, kiuj inkluzivas la partopren-kotizon por kursoj aŭ aranĝoj. Detalojn pri la tarifoj kaj loĝeblecoj bv. peti de KCE, Poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Demandojn pri la ekzamenoj mem direktu al la sekretario de IEK, S. MacGill, p/a Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

La ekzamenoj estos kompreneble proponataj dum la Universala Kongreso en Brajtono, kaj eventuale en la Internacia Junulara Kongreso en Kerkrade (NL) kaj la ILEI-konferenco en Caerlon (GB). La posta ekzamen-sesio en KCE okazos la 11-an kaj 12-an de septembro 1989.

SALTU KUN NI EN MARTON !

Ja, ni malfruis ĉi-numere: retropaŝo por salto antaŭen. Ĉu vi kunsaltos? **La marta numero venos** – jam ne tiom malfrue – **nur al tiuj, kiuj rekotizis por la nuna jaro.** Ĝi kunportos ampleksan kalendaron, rigardon al lingvaj problemoj en la Brita Insularo, debaton pri la difino de transitiveco en Esperanto, novaĵojn el Azio kaj Latinameriko, leterojn, kaj multon alian.

Pri kulturo kaj financoj en Bjalistoko

“Por ke centro estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia,” prave rezonis la Bjalistokaj gvidantoj de la preparlaboroj por la Esperanto-Centro Zamenhof. Aldone al siaj streboj diskonigi la urbon kaj projekton ĉe la Universalaj Kongresoj kaj per la E-elsendoj de la Pola Radio, ili lanĉis fine de 1988 novan kulturan feston. La ampleksan programon de la unuaj Bjalistokaj Esperanto-Tagoj, inter la 15-a kaj 18-a de decembro, partoprenis ĉ. 250 homoj el manpleno da landoj. Ĝojiga surprizo estis la veno de esperantista aŭtobuso el najbara Litovio, kiu konkrete – kaj bonaŭgure por la estonteco – demonstris la kreskantan vojaĝ-liberon trans la sovetian landlimon.

Zamenhof-tagajn ceremoniojn sekvis seminario pri “Esperanto kiel pontolingvo en tradukado”, konferenco por E-instruistoj, libro-ekspozicio, kaj gamo da koncertoj kaj teatraĵoj. Kvankam inter ĉi-lastaj forestis la ege populara *Dekameron* 8,5 de la Bjalistoka Pupteatro, tiom furorinta ĉe la roterdama UK, ĝin iusence anstataŭis egale profesia surscenejigo de *La eta princo* fare de aktorino B. Lukaszewska. Tiu sentoplena adapto de la mondfama infanrakonto (kies bela Esperanta eldono cetere haveblas de UEA) nepre meritas pli vastan kaj internacian spektantaron. Studio P el Toruń montris parton de sia dramigo de *Sinjoro Tadeo*, kaj pluraj lernejoj prezentis kvazaŭ substrekis la enradikiĝon de la Esperanto-instruado en Bjalistoko.

La Esperanto-Tagoj estis kompreneble ankaŭ okazo por kunsido de la estraro de Fondumo Zamenhof – la internacia, pola-Esperanta instanco kies celo estas kunordigo kaj financado de la preparlaboroj por la Bjalistoka Esperanto-Centro. La diskutoj efektive fokusiĝis ĉe la mona demando. Flanke de UEA, oni emfazis la bezonon de detala kaj certigita programo por la Centro antaŭ ol oni turnu sin al eksteraj instancoj por investoj – kio certe necesos, ĉar la en-movadaj rimedoj tute ne sufiĉas por tiel granda projekto. Laŭ ŝajne ĝenerala kompreno, la ĉefan parton de la konstruado mem financos polaj monfontoj; la rolo de la internacia movado estos financi kaj alimaniere subteni la modernan ekipadon kaj postan agadon de la Centro. En Bjalistoko daŭre kreskas la intereso: la loka, sendependiĝonta universitato pretas kunlabori en la funkciigo de interlingvistika fako eĉ antaŭ la finkonstruo.

Ne nur diskuton oni faris pri la financoj: oni ankaŭ agis. Post la kunsido de la Fondumo okazis publika aŭkcio favore al la Centro, kiu en mallonga tempo sukcesis kolekti ĉirkaŭ 700 000 zlotojn (pli ol 2 000 guldenojn). Guto malgranda – sed efika, se oni igos ĝin frapi konstante. Tiucele okazos marte en Bjalistoko internacia seminario kun gvidaj figuroj de la Esperanto-movado, kiu intense diskutos kaj ekdefinitivigos la bazan principaron de la Centro – ĝiajn celojn, ĝian programon kaj ĝian organizadon. Por detaloj skribu al la Fondumo Zamenhof, p/a Pola Esperanto-Asocio, str. Krucza 38/42, PL-00-512 Warszawa, Pollando.

*Sen pag' lerneblas Esperanto...
sed malperfekte, se sen PAG!*

Plena analiza gramatiko de Esperanto

red. K. Kalocsay kaj G. Waringhien

600 p. 24 cm. Bind. 48,00 gld.; 1/3-rabato ekde 3 ekz.



“Letero el Bjalistoko”

Varsovio, decembron 1988

La titolo estas simbola. La letero venas al vi el Varsovio, ĉar tie ĉi havas sidejon la Fondumo Zamenhof, starigita por preparlaboroj lige kun la plano konstrui Centron Zamenhof en Bjalistoko. Kiel sciante, tiu granda projekto estis anoncita dum la Jubilea Esperanto-Kongreso en Varsovio kaj unanime proklamita fare de la Komitato de UEA, pasintjare en Roterdamo, kiel grava celo de la Esperanto-movado.

Antaŭ ol komenci la konstruon de la Centro Zamenhof en Bjalistoko oni devas fronti grandegan laboron en kiu ni, esperantistoj, povas internaciskale partopreni diversmaniere. Interalie jam venis la tempo komenci kolektadon de libroj por venonta granda biblioteko kaj de eksponaĵoj por venonta muzeo. La estraro de la Fondumo prilaboris regularon por tiu agado. Donacojn, librojn kaj dokumentojn oni povas sendi rekte al Bjalistoko, laŭ la adreso:

*Pola Esperanto-Asocio
str. Lipowa 14
PL-15-427 Białystok.*

Dua eblo kontribui estas monpago kiu, kiel riveretoj enfluantaj grandan riveron, subtenos la grandiozan ideon konstrui hejmdomon por Esperanto en ĝia patrolando. Jen la konto:



Artista impresio pri la aspekto je la jarcento-komenco de la tereno por la Centro Zamenhof en Bjalistoko.

Bank PKO SA
II of Warszawa
ul. Kredytowa 3
Nr 5.01031.9002061

Ĉiu mon-donacanto, sendepende de la sumo, ricevos specialan dankleteron. La plenan liston de donacantoj mi prezentos en ĉiu sekva "Letero el Bjalistoko".

Tria eblo partopreni la realigon de la Bjalistoka Centro estas kontribui per ideoj, rimarkoj, sugestoj kaj proponoj pri la Centromem. Jam venis kelkaj leteroj kun valoraj atentigoj. Komuna pensado valoras same multe kiel financa apogo. Pro tio, apud la "Libro de donacoj" ekestas "Libro de ideoj", kie estos notita ĉiu propono kaj sugesto.

Mi finas la unuan leteron per esperdona informo: Fondumo Zamenhof direktas al la Komitato por la Jardeko de Kultura Evoluigo de Unesko proponon enkadrigi la projekton pri la Centro Zamenhof en Bjalistoko en la programon de tiu Komitato. La unua kunsido de la Komitato okazos en Parizo dum januaro 1989. Mi informos vin pri la rezulto.

Kun multaj salutoj el Pollando,

**Ewa Siurawska, direktoro
Fondumo Zamenhof
str. Krucza 38/42
PL-00-512 Varsovio, Pollando**

KONFERENCOJ

Malgranda sed reprezenta kunveno pri strategio

Tridek ses aktivaj movadanoj el dek du landoj kunvenis en la internacia seminario "Sojle al la dua jarcento" de la 5-a ĝis la 10-a de decembro en Ahrenshoop, Germana DR. Malgraŭ la malgranda partoprenantaro, estis tamen reprezentitaj diversaj gravaj internaciaj organoj de la movado, kiel la Akademio de Esperanto (AdE), UEA, TEJO, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Terminologia Esperanto-Centro (TEC), kaj krome unuopaj landaj asocioj (LA) per siaj funkciuloj.

Dudeko da prelegoj konsistigis la ĉefprogramon. Okazis krome pluraj malpli formalaj diskutoj kaj aranĝoj, inter ili renkontiĝo kun la poeto Jiří Karen, diskuto pri la Akademio de Esperanto, prezento de la projekto por Centro Zamenhof en Bjalistoko, kaj lumbildaro pri la Esperanto-movado en Azio. Estis aparte bonvena la partopreno de Regina Thaller, reprezentanto de la Internacia Informa Centro pri Terminologio (Infoterm) en Vieno.

Manko de tempo malhelpis profundan diskuton kaj la ellaboron de interkonsentitaj konkludoj. Tial malgranda laborgrupo kunmetis "bonajn kaj konsiderindajn ideojn kaj sugestojn levitajn el la prelegoj kaj diskutado", el kiuj estas ĉerpitaj la jenaj:

Kategorio 1: Lingvistikaj demandoj

– La Akademio de Esperanto pli ol ĝis nun vivu en sia publiko kaj publikigu pri si.

– Oni okazigu seminarion por vortaristoj, kun la celo verki kaj eldoni normigan vortaron kaj gramatikan libron, uzeblan internacie.

– Okazu aktiva kunlaborado de la akademianoj kaj aliaj esperantologoj kun neesperantistaj instancoj.

Kategorio 2: Strukturaj kaj movadologiaj demandoj

– Oni uzu la rezultojn de la jamaj strategiaj seminarioj kaj daŭrigu la organizadon de pliaj, prefere kun pli limigita temaro.

– UEA estu konsiderata kaj celu funkcii kiel servo-centro por la tutmonda esperantista komunumo, inkluzive de punta rolo inter la diversaj lokaj Esperanto-centroj.

– UEA klopodu trovi taŭgajn solvojn al la transpaga problemo en diversaj landoj, ekz. per komuna eldonado de libroj k.s.

Kategorio 3: Priservaj demandoj

– Oni emfazis la gravecon de atento al la membraro kaj al la ekstereŭropanoj kaj la junularo.

– Oni dediĉu apartan atenton al la kompletigo, ĝisdatigo kaj kunlaborado de landaj kaj fakaj bibliotekoj.

– Oni kuraĝigu la fakan uzon de Esperanto por la pliklerigo de la esperantistaro.

Kategorio 4: Edukaj kaj informaj demandoj

– Oni donu pli altan prioritaton al edukado, kaj lingva kaj movada-organiza. En TEJO kaj UEA oni starigu sistemon por la transdono de scio kaj sperto de generacio al generacio.

– Oni starigu "centron pri informado kaj dokumentado" por disponigo de efikaj materialoj, kaj pliampleksigu la disponeblajn komunikilojn (ekz. per telekso, telefakso kaj komputilaj datum-bankoj).

– Oni kultivu la interkulturan pontorolon de Esperanto.

Kategorio 5: Sciencaplikaj demandoj

– Oni distingu inter la scienca kaj hobia agadoj, kaj apogu la plivastiĝon de la fakaj asocioj.

– Oni stimulu la sciencan esploradon pri Esperanto, en la junulara movado kaj ĉe jam establitaj fakuloj, i.a. per aperigo de tiutemaj artikoloj. Temas pri lingvistiko, sociologio, historio, tradukologio k.a.

– Oni celu ellabori scienc-teknikajn projektojn, realigeblajn nur per la internacia kunlaboro de esperantistoj, kaj serĉu subvenciojn por realigi ilin ekster la movado.

Kaj jen jam unu reago al tiuj rekomendoj, flanke de partopreninto:

La “oni”-diroj de Ahrenshoop

La titolo de mia prelego dum la seminario estis “Rekono de la realeco – bazo de ĉiu strategio”, kaj mi elektis la temon pro la spertoj dum la Universala Kongreso en Roterdamo, kie mi observis la “movadologian simpozion”. La prelegojn kaj diskutojn tie mi resumis kiel “generaloj sen armeo”. Kiel militestroj ili tie debatis pri la plej urĝaj bezonoj kaj elpensis strategiojn kaj atakojn – sed la strategiistoj de la movado ne rimarkis ke mankas la armeo, la laborfortoj por realigi la strategiojn. Pro tio la strategioj kaj laborplanoj povas esti korektaj kaj raciaj, sed ili ne valoras sian paperon ĉar ili ne estas realigeblaj.

En Ahrenshoop mi intencis evoluigi tion kaj desegnis bonvole akceptitan bildon, sur kiu la estraro de UEA sidas en nubo, kiu ne nur ŝvebas super la varia kaj vivoplena Esperanto-mondo, sed ankaŭ malhelpas la rekonon de tiu ĉi mondo. La aliaj prelegoj dum la tago kiam mi ĉeestis, kaj finfine la tajpitaj “rekomendoj”, instruis min ke mia kritiko ne estas komprenata kaj akceptata. Kiel kutime, se la eminentuloj de la movado konferencas, ili prezentas liston de la plej urĝaj taskoj kiujn “oni” devas fari.

La “rekomendoj de Ahrenshoop” pli klare ol aliaj strategiaj proponoj pravigas mian impreson, ĉar pli ol la duono de la unuopaj rekomendoj komencas per la vorto *oni* aŭ direktas sin al iu alia malpreciza, duba aganto aŭ grupo de agantoj – evidente la tuta esperantistaro, kiu sentu sin devigata realigi la rekomendojn. Sed kontraste al komerca entrepreno, ŝtata administracio aŭ socia organizaĵo, la Esperanto-movado ne disponas pri agantoj, kiuj realigas la strategiojn de ĉefoj, ĉu pro premo, ĉu pro mono. La esperantistoj estas aktiveblaj, nur se ili estas konvinkeblaj.

Dum la lastaj cent jaroj la Esperanto-movado kreis abundon da strategiaj planoj kiuj sufiĉe ofte fiaskis, ĉar neniu transprenis la praktikan realigon. Tio ne signifas ke la planoj estis eraraj. La “rekomendoj de Ahrenshoop” entenas nenion kontraŭindan, sed ili estas senutilaj, ĉar ili ne indikas kiu faru kion, kaj kiamaniere.

La kreantoj de la fiaskantaj strategiaj planoj ĉiam plendas ke neniu pretas kunlabori – sed ili neniam demandas kion la eventualaj kunlaborantoj volas fari. La “rekono de la realeco” pro tio signifas, ke la unua paŝo devas esti demandi la esperantistaron kion ĝi atendas de Esperanto, kaj kion ĝi intencas fari. La landaj kaj internaciaj organizaĵoj ĉiam prezentas laborplanojn, kiujn ili trudas de supre. Ili neniam esploras la interesojn kaj kapablojn de la lokaj grupoj kaj individuoj, kaj neniam sentas sin devigataj krei strukturon kiu kombinas la laborkapablojn, monprovizojn kaj materialojn ekzistantajn kaj ekestantajn ĉe la malalta tavolo. La strategioj de supre do signifas nur laboron aldonan al propraj aktivaĵoj malsupre.

Per mia prelego mi intencis atentigi pri la fakto, ke antaŭ la verkado de iu strategio por la dua jarcento, estas necese havi realisman bildon pri la stato de la movado kaj la deziroj kaj interesoj de ĝiaj membroj. Sendepende de strategiaj planoj, la esperantistoj organizas renkontiĝojn kaj vojaĝojn, verkas kaj

disdonas informilojn, organizas kursojn, ludas teatron, tradukas, kantas, fondas novajn organizaĵojn kaj eldonas revuojn. Krom la realigataj projektoj ekzistas multaj ideoj kaj planoj kiuj ankoraŭ ne estas realigataj, pro manko de mono aŭ pro aliaj malhelpoj.

Sojle al la dua jarcento la movado devas lerni, ke ĝia forto povas ekesti nur el la sinergia agado de liberaj individuoj kaj grupoj. La tasko de la naciaj kaj internaciaj strukturoj devas esti, krei la eblojn por kontaktoj kaj por kunlaboro per korektaj kaj kompletaj informoj. Anstataŭ verki kaj propagandi ĉiam novajn planojn kiuj similas al pli fruaj fiaskintaj, la naciaj kaj internaciaj organizaĵoj esploru, kiel kaj kie ili povas subteni kaj kombini ekzistantajn kaj funkciajn projektojn, prezenti la plej sukcesajn kiel modelojn, kaj ne silenti pri eraroj.

Ke mi ne parolas pri teoriaj aferoj pruvas la ekfloro kaj progreso de la movado en okcidenta Berlino dum la lastaj jaroj, kiu ne agas laŭ iu skema strategio, sed eluzas la ekzistantajn eblojn kaj utiligas la individuajn kapablojn kaj interesojn de la membroj por la komuna celo. Ĉiuj estas invitataj studi la modelon de Berlino surloke.

Roland Schnell (FR Germanio)

INFANA KONGRESETO

Post “kara Roterdamo”...

... La trian tagon ni unue iris al muzeo kaj poste iris al la plej granda turo de Roterdamo. Oni nomas ĝin Ajromastro! Ĉu ĝi signifas la mastro de la aero? [Temas pri *Ēuromasto*. –red.] La muzeo ne estis tre interesa. Ĉar tie estis nur ostoj de la bestoj kaj vestoj de la homoj en diversaj landoj. Tamen ni multe ŝercis inter ni. Jam de la unua tago mi amikiĝis al ĉiuj kongresetanoj. Sed la turo estis vere bela. Kiam ni iris al la finlasta etaĝo ni vidis la tutan urbon sub niaj piedoj. Per teleskopoj ni rigardis al ĉiuj partoj de kara Roterdamo. Tie estis multaj teleskopoj grandaj kaj malgrandaj. Ni ĉiuj ĝuis sur la turo!

... En la kongreseto, ni engrupiĝis en kvar grupojn: Kobroj, Zebroj, Pandoj, kaj Vulpoj. Kobroj devis lavi la telerojn kaj manĝilojn post tagmanĝo. Zebroj devis lavi post matenmanĝo kaj Pandoj post vespermanĝo. Sed Vulpoj devis lavi tablojn post matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo!

Estis la unua fojo ke mi en mia vivo disiĝis de mia familio, kaj dum unu semajno de mia patro, sed mi miras ke mi ne sentis min sola kaj ili tute ne mankis al mi.... Mi havis multon por vidi, aŭdi, ludi kaj ĝui. Nia kongreseto estis en belega loko. Kiam s-ino Sadigi vidis la lokon, ŝi diris al mi ke post nun ŝi aliĝos al infana kongreseto. Sed mi kredas ke ŝi ne povas...

Mi scias ke nur per Esperanto mi povis vidi ĉion, kion mi rakontis. Mi pensas ke neniu lingvo similas al Esperanto kaj havas tian eblecon. En Kongreseto mi trovis multajn amikojn de diversaj landoj: Pollando, Italujo, Koreujo, Francio, Irlando, Bulgario kaj aliaj landoj. Nun mi havas multajn adresojn de ili kaj mi skribas leterojn.

Nima Firuzi (Irano, 12-jara)

... en *Roterdamo* du knaboj Ŭonĉjo kaj Ukĉjo sukcese finis la unuan partoprenon en la 24a Infana Kongreseto dank’ al la afablaj gvidantoj kaj helpantoj. Ili ĝojis renkontiĝi kun korespondantoj Simon kaj Peter el Irlando, kaj aliaj ĉ. 30 infanoj el diversaj landoj. Ili havas tre karajn memorojn pri interesaj kaj utilaj programeroj, kaj pri la vizitoj al naĝejo, farmbieno, ventomuelejo, alta turo kaj miniatura urbo Madurodamo....

el vojaĝraporto de la familio So (Koreio)

AIS-PROGRAMO 1989


Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS) petas sendi preleg-ofertojn por la 6-a Sanmarina Universitata Sesio kaj por la Studadsesio de AIS kune kun Academia Sinica en Beijing nepre ankoraŭ antaŭ la 15-a de marto 1989. SUS 6 okazos en San Marino de la 27-a de aŭgusto ĝis la 4-a de septembro 1989, la Studadsesio en Beijing de la 20-a ĝis la 26-a de septembro 1989. Kandidatiĝoj por la adapta adopto de sciencistaj gradoj fare de AIS eblas ĝis la 23-a de marto 1989 – alikaze la ekzameno ne plu certe povos okazi dum SUS 6, kaj ĉiukaze ne plu sen pago de malfruiĝkotizo!

AIS krome petas proponi por alvoko kiel profesoroj de AIS sciencistojn, kiuj estas kaj fake elstaraj kaj bonege parolantaj la internacian lingvon. En tiuj kazoj la Senato de AIS ricevis de la Ĝenerala Asembleo

la rajton, sen postuli la antaŭan plenumon de formalaĵoj, honorige alvoki en la rangon de efektivaj membroj de AIS.

Ĉiu, kiu komprenas la internacian lingvon almenaŭ skribforme kaj plenumis universitatnivelan studadon almenaŭ dujaran (ĝis la ŝtupo de bakalaŭreco) povos akiri la apartenecon al la Internacia Scienca Kolegio de AIS almenaŭ kiel libera ISK-ano, se li aŭ ŝi plenigita resendas "pripersonan informilon" por la Internacia Sciencista Dokumentaro. La "simbolan membro-kotizon" (jare kvar internaciaj respondkuponoj) transprenas laŭpete en kazo de transpagaj aŭ aliaj malfacilaĵoj la Dr. Klemm-Fonduso.

Skribu al la Prezidanta Sekretariejo de AIS, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio. Artikolo pri AIS aperos en la marta numero.



Eĉ pli taŭgan ejon ol tiun de la roterdama IK (maldekstre) proponas St Aubyn's College, Brajtono (dekstre).

... ĉu vi konas taŭgan infanon?

Taŭga por kio? – Taŭga por ĉeesti la 25-an Infanan Kongreseton kadre de la 74-a Universala Kongreso.

Ni trovis ege plaĉan lokon por tiu kongreseto, kaj tie ni bonvenigos kvindek infanojn, pri kiuj okupiĝos 15 gvidantoj kaj junaj helpantoj.

Ĉu necesas ke la elektitaj infanoj kapablu perfekte paroli Esperanton? Certe ne. Plej gravas ke ili *volu* paroli ĝin. (Kompreneble ĉiu infano devas havi bazan scion de la lingvo, tian kian inteligenta knabo aŭ knabino povas atingi post unu-du jaroj da studado.)

La IK okazos en privata lernejo kun komfortaj kaj negrandaj dormĉambroj, bela manĝejo, nova sporthalo, propra naĝejo, kaj granda ludejo subĉiela. Ĉio do povos okazi sur la sama bieno, kvankam kompreneble estos ankaŭ ekskursoj. La loko estas aŭtobuse atingebla de la UK-ejo.

Multo estos ĉi-jare organizita antaŭ la kongreseto. Ekzemple, la infanoj dum majo ricevos liston de la partoprenontoj; tiuj kiuj havas muzikan aŭ aktoran talenton ricevos partojn dum junio.

La teamo de gvidantoj kaj helpantoj estas jam preskaŭ kompleta.

Ni revenu al taŭgeco. Lingva entuziasmo estas nur unu el la serĉataj kvalitoj. Ankaŭ gravas ke la knabo aŭ knabino estu ja ankoraŭ infano, kaj ne adoleskulo kiu ŝatas moŝtumi inter pli etaj geknaboj. Pro tio la ĝenerala aĝlimo estas je 12 jaroj, sed tio ne estas absoluta: ĝi dependas de la matureco de la infano.

Trie, oni akceptas nur infanojn kiuj volonte partoprenos (laŭ siaj kapabloj) la diversajn programerojn, kaj kiuj ne prezentos disciplinajn problemojn. Laste, ni postulas ke la gepatroj nomu iun (kompreneble plej probable sin mem) kiu, ĉeestante la UK-on, respondecos pri la infano okaze de krizo. (Espereble ne estos krizoj, sed ili ja kelkfojis dum pasintaj IK-oj!)

Nu, se laŭ tiuj indikoj vi konas taŭgan infanon (parencon, lernanton, najbareton), nepre informu min, la Komisiiton pri Infanaj Aferoj. Detaloj pri la infano pli gravas ol internaciaj respond-kuponoj; tamen ankaŭ tiuj estos bonvenaj!

Christopher Fettes
St Columba's College
Dublin 16, Irlanda Resp.

Verda ondo ruliĝas el Sovetio

Inter la plej efikaj utiligantoj de Esperanto dum la lastaj jaroj estas ruso Lev Medvedev. Jen nomo eble nekonata al plimulto de niaj legantoj – sed la streboj de Medvedev jam sukcesis ekstarigi “esperanteman” ekologian movadon en Sovetio, kies internaciskala uzo de la lingvo atendas nur praktikan respondon de alilandaj esperantistoj.

En 1986 Medvedev, kiel la prezidanto de la Moskva Scienca Esperanto-Klubo (MSEK), eklaboris en la organiza komitato de la “Dnestraj ekspedicioj” – ĉiujaraj naturprotektaj vojaĝoj laŭ la granda rivero tra suda Ukrainio kaj Moldavio. La tre sukcesa ekspedicio de tiu jaro, inter kies 200 partoprenantoj duono estis esperantistoj, altiris grandan publikan atenton kaj helpis rezultiĝi la fondon de “Interrespublika Publika Komitato ‘Dnestr’” por la protekto kaj riparo de la rivera ekologio.

Kuraĝigita per tiu sperto, Medvedev serĉis pli internacian forumon por apliko de la samaj ideoj. Ĉe la Jubilea Kongreso en Varsovio, julion 1987, li gvidis diskuton pri la temo kiu konkretiĝis en “Interkonsento pri internacia kunlaboro naturprotekta helpe de Esperanto”. Per tiu dokumento li sukcesis enkadrigi ekologian labortagon en la t.n. “Ondo de paco”, sovetia iniciato por tutmonde marki la UN-Tagon de la Malarmado (la 24-an de oktobro 1987).

Alvoko estis dissendita al sovetiaj E-klubo kaj sepdek da landaj E-asocioj, kaj la propraj streboj de Medvedev arigis 15 organizaĵojn kaj entute kvar mil moskvanojn por unutaga rebonigo de la moskva parketo Alka Insulo. Esperantistoj en dudeko da aliaj sovetiaj urboj sukcesis aranĝi paralelan agadon, kaj aro da amas-komunikiloj raportis aprobe pri la esperantista iniciato.

En 1988, dudeko da sociaj organizaĵoj en Sovetunio konsentis kunlabori por el tiu ekologia “labortago” fari dumonatan laborperiodon (de la 3-a de aprilo ĝis la 5-a de junio). En tiu “Internacia Ekologia Ago de Volontula Laboro ‘Verda Ondo-88’” kunlaboris miliono da homoj en centoj da urboj, kiel rekonis i.a. frontpaĝa artikolo en la tutlanda ĵurnalo *Komsomolskaja pravda*. Kunagis ankaŭ hungaraj esperantistoj, kiuj disdonis dudek mil flugfoliojn sur la stratoj de Budapeŝto pledante por urba aerpuriga politiko. Samtempe okazis la ekspedicio “Dnestr-88”, laŭ priskribo de Medvedev “purigante riverbordojn de rubaĵoj, rekreante akvofontojn, kunigante civitanojn por ekologiaj mitingoj kaj diskutoj”.

La kreskanta prestiĝo de la esperantistoj en sovetiaj ekologiaj medioj faris ilin bonvenaj partoprenantoj ankaŭ en ne-Esperantaj aranĝoj. Ekzemple, unuafoja internacia ekologia tendaro por kvarmilo (!) da geknaboj el 65 landoj, okazinta en la urbo Artek (Krimeo) en julio kaj aŭgusto 1988, fariĝis samtempe forumo por klarigi la utilon de Esperanto, eĉ ekinstrui ĝin al la

plej interesitaj infanoj. Samtempe la intereso kreskas inter la esperantistoj mem. Interalie, la lasta Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (aŭguste 1988 en Urjupinsk-Volgograd) rezoluciis favore al la kreo de “ekologiaj Esperanto-klubo, ekosekcioj ĉe Esperanto-klubo aŭ Esperanto-sekcioj ĉe ekologiaj kluboj-unuiĝoj” kaj por la subteno de estontaj naturprotektaj aktivajoj.

Tiel, per kelkaj jaroj de praktika laboro, kreiĝis firmaj ligoj inter ĉi tiuj du “verdaj” movadoj en Sovetio. Dume la cetera Esperanta mondo apenaŭ ekkonsciis pri ĉio ĉi. Estus bela komenco, se ĉi-jare oni pli vaste respondus al la plej lastaj alvokoj de la Ekologia Sekcio de ASE (nun SEU):

1) En 1989-1990 laŭ itinero Sovetunio-Hispanio-Kubo-Usono estas planata “transoceana scienc-sporta ekspedicio sur polimarano ‘Sprut-M’”, ekologia pura ŝtormrezista ŝipo de originala konstruo. La ekspedicio iros laŭ la vojo de Kristoforo Kolumbo, de kies vojaĝo la 500-jariĝo estos celebrata en 1992. Ĝia internacia organiza komitato uzas kiel laborlingvojn la rusan, anglan, hispanan kaj Esperanton. Ni estos dankaj pro ajna helpo – morala, reklama, organiza, financa... Iuj aparatoj por ekspres-analizoj de la mara akvo troveblas nur eksterlande. Ni atendas de la ĉebordaj urboj invitojn, kaj esperas ke vi helpos organizi utilajn kontaktojn de la ekspedicio kun lokaj



Partoprenantoj de la seminario “Dnestro vokas por helpo” en Ternopolo, 1987.

civitanoj laŭ la itinero Finnlando, Svedio, Pollando, GDR, Danio, FRG, Anglio, Francio, Portugalio kaj Hispanio; en 1990 Hispanio, Kanariaj Insuloj, Kubo kaj Usono. Speciala programo estas planata por la Universalaj Kongresoj en Braĵtono (1989) kaj Havano (1990). Viajn proponojn sendu al R.R. Rjajknenen, Ekspedicio “Sprut-M”, SPK, pr. Mira 36, SU-103885 Moskvo; gazetarajn artikolojn al L. Medvedev (adreso malsupre).

2) “Verda ondo-89” (de la 1-a de aprilo ĝis la 5-a de junio) atendas vian subtenon. Ni – esperantistoj – povas esti avangardo de novaj formoj de internacia kunlaboro, proponante nian lingvon kaj nian mondan reton de aktivuloj por solvi aktualajn mondajn problemojn. Dank’ al tio ni povas alte levi la socian prestiĝon de la Esperanto-movado. Por informoj kaj sugestoj pri agado skribu al: L. Medvedev, SEU-Ekosekcio, pr. Mira 196-44, SU-129128 Moskvo.

La venko estas procedo, ne okazo

En la diskutado pri la estonta vojo por la esperantista movado, mi petas permeson esprimi vidpunkton eble unikan. Mi volas diri enkonduke ke mi eklernis la internacian lingvon dum la somero de 1933. Mi do partoprenis pli ol duonon de la tuta historio de la lingvo. Post kvindek jaroj kiel esperantisto, oni jam ne plu estas naivulo. Frenezulo eble – naivulo ne.

Starante sur la soklo de kvindek kvin jaroj da spertoj, kaj rigardante la aktualan situacion, mi konstatas bonan novaĵon kaj malbonan novaĵon. La bona novaĵo estas, ke Esperanto estas jam sukcesa. La malbona novaĵo estas, ke la esperantistoj mem ankoraŭ ne konscias tion. La sekvo estas, ke ili ne uzas la lingvon tiom kiom ili povus kaj devus, ne utiligas ĝin por multaj celoj por kiuj ĝi ja bone taŭgus.

Mi vidas du gravajn kialojn por tiu manko de konscio pri la sukceso de la lingvo. Unu estas, ke oni komparas Esperanton kun la angla lingvo. Tio estas grava eraro. La angla lingvo estas mondlingvo, Esperanto estas internacia lingvo, kaj oni ne rajtas kompari unu kun la alia. Kiam mi volas propagandi Esperanton al usonanoj, mi ofte diras, “Esperanto estas la lingvo de tutmonda amikeco.” Ĉu vi povas iri al Irano, al Nikaragvo, aŭ al Vjetnamio, kaj diri, “La angla lingvo estas la lingvo de tutmonda amikeco”? Vi estus bonŝanca se oni simple ridus al via vizaĝo.

La angla lingvo estas la gepatra lingvo de multaj milionoj da homoj, loĝantaj en pluraj kontinentoj. Ĝi estas la nacia lingvo de unu el la du t.n. “superpotencoj”, kaj de la ĉeflando de la Brita Regno (kaj pli frue de la Brita Imperio). Ĝi estas la plej taŭga lingvo por la tutmonda disvastigo de informo, kaj tial oni ofte diras ke la angla estas “la internacia lingvo de komerco”, aŭ “la internacia lingvo de scienco kaj tekniko”. Tiuj asertoj estas malprecizaj kaj misgvidaj. Mi rimarkas, ke nederlanda komercisto en Germanio parolas la germanan, ne la anglan, kaj en aliaj situacioj simile.

En scienco kaj tekniko, la angla estas nemalhavebla lingvo internacie, sed ne la internacia lingvo. Kiam mi faris doktorajn studojn en ekonomiko, mi konatiĝis kun studento de matematiko. Li lernis la rusan lingvon, kaj klarigis ke oni ne povas esti profesia matematikisto sen tiu lingvo. Mia filino studis, pro mia insisto, dum du jaroj la latinan lingvon en la lernejo. Tiam ŝi protestis, “Paĉjo, mi ne ŝatas la latinan, kaj ĝi neniel utilos. Mi studos la hispanan lingvon.” Dum kvar jaroj en la gimnazio ŝi studis la hispanan. Tiam, en la universitato, ŝi lernis dum unu jaro la francan. Mi mem instruis al ŝi Esperanton, kaj ŝi konas kompreneble la anglan. Ĉu tiuj kvin lingvoj sufiĉis? Kiam ŝi komencis doktorajn studojn en kemio, oni diris, “Vi devas lerni la germanan lingvon se vi intencas esti kemiisto.” Mi ne dubas, ke germana studento de kemio aŭ rusa studento de matematiko

devas lerni la anglan, sed ĉi tiu ne estas ekskluzive “la internacia lingvo” de scienco.

Se la angla estas mondlingvo, Esperanto tamen estas la internacia lingvo. Ekzistas ludo vaste konata hodiaŭ, en kiu oni donas la respondon, kaj la ludanto devas diveni la demandon. Ekzemple, se la respondo estas “Humphrey Tonkin”, la demando devas esti, “Kiu estas la prezidanto de UEA?” Se vi diras al klera homo, ie ajn en la mondo, “La respondo estas ‘internacia lingvo’,” tiu persono nepre respondos, “La demando estas: ‘Kio estas Esperanto?’” Nur malklerulo diros, “Mi ne scias.” Ĉie en la mondo hodiaŭ, Esperanto signifas internacian lingvon, internacia lingvo signifas Esperanton. Ni devas akcepti tiun fakton.



Praktiko laŭ prediko: la aŭtoro, komitatano de UEA, ankaŭ redaktas unu el la plej bonaj fakaj informiloj en Esperanto.

La alia kialo por la nomita manko de konscio estas eĉ pli grava. Iam dum la pasintaj cent jaroj, iu malbenita, kvankam bonintenca esperantisto elpensis la esprimon “la fina venko”. De tiu tago, esperantistoj fantazias pri la fina venko, kaj prokrastas ĉian utiligon de sia lingvo atendante tiun epifanion. Tial ili ne konstatas, ke Esperanto estas jam sukcesa en la rolo de internacia lingvo!

Iu diras, “En la fina venko, oni instruas Esperanton en la lernejoj.” Sed karulo, oni jam instruas Esperanton en la lernejoj. La statistikoj pri tio estas ĉiujare publikigataj, vi povas rigardi ilin. Alia diras, “En la fina venko, la registaroj akceptos Esperanton.” Sed amiko, la registaroj jam akceptas Esperanton. La prezidentino de Islando venis al la

Rejkjavika Kongreso. La prezidento de la pola parlamento venis al la Varsovia Kongreso. La pola registaro donacas la Bjalistokan Centron al la esperantistaro. La ĉina registaro subvencias la gazeton *El Popola Ĉinio*, la hungara subvencias *Hungara vivo*. Ĉu iu supozas ke kelkaj malavaraj samideanoj pagas la grandegajn kostojn de tiuj belegaj gazetoj el la propraj poŝoj? De la norvega Ministerio por Eksterlandaj Aferoj mi ĵus ricevis novan eldonon de la broŝuro “Norvegujo”. Sur miaj librobretoj jam staras aliaj verkoj: “Faktoj pri Danlando”, “Faktoj pri Germanio”, kaj tiel plu.

Registaroj konsistas el politikistoj. Politikistoj estas profesie realistoj. Ili komprenas, pli bone ol la esperantistoj mem, ke Esperanto plenumas la rolon de internacia lingvo, ke ĝi plenumas tiun rolon kun sukceso. Ili ne supozas, ke ĝi estas mondlingvo kiel la angla, sed ili volas profiti de ĝia ĝisnuna sukceso. Ili scias, ke la lingvo posedas multajn adeptojn, ke ili troviĝas en ĉiuj partoj de la terglobo, ke ili havas iujn specifajn personajn trajtojn, nome, ke ili estas scivolemaj, neniel ŝovinismaj, kaj havas intereson pri aliaj landoj kaj pri internaciaj aferoj. Tial la registaroj akceptas Esperanton tia, kia ĝi estas.

Ni do ne fantaziu plu pri malproksima tago kiam venos la fina venko. Ni ĉiuj devas kompreni, ke ni neniam vidos tiun tagon, kaj neniuj vidos ĝin. Ĝi neniam venos. Ĉu iu vere kredas, ke iam ĉiu infano lernos Esperanton apud la gepatra lingvo? Neniu estas vere tiel freneza.

La venko ne estas unu grandioza evento, sed senfina sinsekvo de malgrandaj venkoj. Kiel matematika serio, ĝi alproksimiĝas (ja malrapide) al limo kiun ĝi neniam povas atingi. La venko estas procedo, ne okazo. Ni ne fantaziu plu pri ia fina venko, sed ni eniru la vojon de senĉesa venkado! Senĉesa venkado signifas akcepti la fakton, ke Esperanto estas jam sukcesa *en la rolo de internacia lingvo*, kaj iri antaŭen de unu malgranda venko al la sekvonta.

*unika libro pri unika okazo;
komuna kreaĵo de centjara movado;
distra kaj pensiga, sobra kaj inspira:*

jubileo

Dudeko da famaj aŭtoroj kaj sesdeko da landoj
en raportoj, eseoj, poemoj kaj bildoj

Mendu de la Libroservo de UEA: 57,00 gld.

Triona rabato ekde tri ekzempleroj

Ni devas transiri de propagando per vortoj al propagando per agoj. Ni devas senĉese kongresi, konferenci, prelegi, verki, eldoni, kaj daŭrigi nian korespondadon, vojaĝadon, babiladon. Ĉiu internacia konferenco, ĉiu nova libro, ĉiu numero de gazeto estas pli efika propagandilo ol cent flugfolioj aŭ informiloj. Kiam mi montris la novan libron *Molekuloj* al mia filino (nun jam profesorino de kemio ĉe eminenta universitato), ŝi diris, "Se miaj studentoj konus ĉion kion mi vidas en tiu libro, mi estus pli ol kontenta." Jen propagando, ĉu ne? En la Jarlibro de UEA troviĝas 1670 fakdelegitoj. Se ĉiu el ili verkus nur unu artikolon en sia fako ĉiujare, Esperanto baldaŭ posedus vastan teknikan literaturon. Tio estus ne nur valora kontribuado proprarajte, sed ankaŭ gravega propagando al la tuta mondo.

Esperantisto kiu volas propagandi la lingvon per vortoj estas devigata haki la vojon tra ĝangalo de disputoj, argumentoj, hipotezoj, asertoj, antaŭjuĝoj, premisoj – ĉiuj falsaj. Tiu kiu simple montras la uzadon de Esperanto en la internacia vivo, lumigas kvazaŭ el lumturo vojon jam ekzistantan, "klaran, kaj rektan, kaj tre difinitan".

Ni devas transiri de instruado per lernolibroj kaj kursoj al instruado per partoprenado. Tiu kiu uzas la lingvon, majstras la lingvon. Tiu kiu daŭre studas la lingvon, paŝon post paŝo, kurson post kurso, restas eterna komencanto. Kiam ni utiligas Esperanton, ni instruas ĝin. Utiligi ĝin signifas fari ĝin utila, ne nur por ni mem, sed ankaŭ por tiuj kiuj eklernos ĝin morgaŭ, postmorgaŭ, kaj en venontaj jaroj. Ju pli da ebloj por praktika uzado de la lingvo ni disponigas, des pli da adeptoj ni kreos, des pli da komencantoj ni transformos al progresintoj.

Oni rajtas plori, konstatante kiom da esperantistoj prokrastas la utiligon de la internacia lingvo ĉar ili komparas ĝin kun la angla, kaj sopiras pri la fina venko. Ni ne fantaziu plu pri la fina venko, sed ni eniru la vojon de senĉesa venkado!

Thomas A. Goldman (Usono)

Ĉu aliaj principoj?

En la oktobra numero prezentiĝis la nova Strategia Plano de UEA. Tie ĉi mi kritikos ne nur la bazajn principojn de ĝi, sed ĝenerale la principojn sur kiuj baziĝas plej multa agado en la Esperanto-movado.

La kolonoj de la Strategia Plano estas la *bazaj celoj* kaj la *prioritatoj*. Mi ripetos ilin jene en mallongigita formo:

Bazaj celoj: (a) Disvastigi la uzadon de Esperanto. (b) Solvi la lingvan problemon. (c) Plifaciligi la rilatojn inter homoj. (ĉ) Kreskigi solidarecon inter la membroj.

Prioritatoj: (a) Disvastigo de Esperanto. (b) Utiligo de Esperanto. (c) Edukado al tutmonda konscio.

Poste (en 55) estas klarigite, ke ĉefaj estas "informado kaj instruado".

Sub ĉi tiuj celoj kaj prioritatoj kaŝiĝas evidente la fundamenta principo: "*Ni varbu pli da esperantistoj.*" Tiu estas la efektiva bazo de plej multa Esperanta agado: varbado ĉiam, ĉie kaj je ĉiaj kostoj. Tio estis, kaj laŭ la nova plano restos, la ĉefa strebo de UEA kaj de la movado ĝenerale.

Varbado kiel ĉefa strebo bedaŭrinde kondukis nin esperantistojn al mispaŝoj. Ni troigas en la propagando la nombron de Esperanto-parolantoj. Nombroj inter kvin kaj dek milionoj estas ĉiutaga fantazio. Direktoro elbuŝigas en propaganda videfilmo, ke UEA havas 40 000 "aktivulojn"! Ni fantazias pri "nur 16 gramatikaj reguloj", dum ĉies lernolibro enhavas multe pli. Ni asertas, ke dum Esperantaj aranĝoj nur Esperanto estas parolata, dum en la realo la krokodiloj svarmas. (En la Jubilea Varsovia UK eĉ kelkaj funkciuloj sciis paroli nur en naciaj lingvoj!). Ni spektadas teatrajn prezentojn de "Esperanta" kulturo, dum la aktoroj surscenejaj nur papagas parkerigitan tekston apenaŭ vorton komprenante. Mi povus daŭrigi, sed la ekzemploj sufiĉu. La cititaj fenomenoj ĉiuj fontas el nia emo ĉiam pensi nur pri kiel ni povus varbi pli da esperantistoj. Nia movado bezonas alian filozofion, kiu ne baziĝas sur varbado.

Ni scias, ke multaj homoj ĉiujare eklernas Esperanton, sed plej multaj el ili poste forlasas tute la internacian lingvon. Multaj eĉ fininte kurson iras al renkontiĝo, kaj poste ĉesas. Kial? Laŭ mi pro tio, ke ilin ne kontentigas la nuna stato de Esperanto. Ili vidas, ke ne ĉio funkcias laŭ la propagando. Ekzistas sufiĉe da homoj, kiuj volonte ekinteresiĝas tute senpere pri la lingvo. Se ni nur sukcesus *reteni* tiujn, la movado kreskus sen tro da varba propagando.

Kiajn celojn kaj principojn ni do havu? La bazaj celoj, disvastigo de Esperanto ktp., kompreneble restu, sed la manieroj atingi ilin aliĝu. Mi preferus la jenajn prioritatojn *en ordo de graveco*:

1. *Altigo de la kvalito de la per-Esperanta agado.* Tio signifas ke tiuj, kiuj jam scias Esperanton, uzu ĝin pli bone. Ne indas serĉi novajn esperantistojn, se la jamaj ankoraŭ nur lame utiligas la lingvon. Niaj kongresoj uziĝas tro por provi imponi al la ekstera mondo, kaj maltro por ke la esperantistoj povu uzi sian lingvon kaj ĝui la Esperantan kulturon. Alia speco de fuŝaj aranĝoj estas tiaj naciaj renkontiĝoj, kiuj ekzistas preskaŭ nur por sociaj kontaktoj inter rondeto da aktivuloj, kaj en kiuj oni apenaŭ uzas la internacian. En Esperanta aranĝo oni aŭ lernu Esperanton, aŭ uzu ĝin (ne gravas ĉu por seriozaj aŭ malseriozaj celoj), aŭ planu (en Esperanto) la organizan laboron. Sed oni ne nur trinku teon, rostu kolbasojn, kaj babilu nacilingve (por tio jam ekzistas aliaj movadoj pli taŭgaj). Ni ne nur ŝercu pri krokodiloj, sed komencu serioze ekstermi ilin kaj precipe la kaŭzojn, pro kiuj ili ekzistas. Ne surpriziĝu se oni krokodilas

dum renkontiĝoj, kies celo estas sociaj kontaktoj inter samlingvanoj! Bezonatas ankaŭ multe pli da subteno al la propra Esperanta kulturo. Anstataŭ dungi por la distraj programoj en kongresoj artistojn, kiuj ne scias Esperanton, aŭ eĉ uzas naciajn lingvojn sursceneje, ni dingu esperantistojn, kiuj prezentas kulturon en Esperanton.

2. *Altigo de la kvalito de la lingvo.* Esperanto ankoraŭ ne estas matura. Mankas al ĝi amasoj da vortoj fakaj kaj ĉiutagaj. Pri multaj lingvaj punktoj mankas unueco. Ni ne nun propagandu Esperanton kiel lingvon jam pretan kaj por ĉio taŭgan, ĉar tio simple ne estas vera.

3. *Plibonigo de la instruado de la lingvo.* Nun la stato de lerniloj, ĉefe vortaroj kaj gramatikoj, estas mizera. Unuavice ni devas altigi la lingvonivelon de la jamaj esperantistoj. Kial amase instrui Esperanton al novuloj, se plej multaj esperantistoj ne scias paroli perfekte? En multaj landoj la lernantoj pendas en vakuo post la elementa kurso. Progresaj kursoj maltraas, kaj en la loka klubo oni apenaŭ parolas Esperanton.

4. *Altigo de la kvalito de la propagando.* Ni ĉesu mensogi. Forgesu pri la dekmilionoj. Diru: "Eble ĝis unu miliono, sed neniu scias". Eks pri la 16 reguloj. Diru nur, ke Esperanto estas la plej facila lingvo. Kaj ĉesu provi varbi ĉiujn. Nur informu pri kio okazas en Esperanto, kaj kiel eblas lerni la lingvon, sed prefere nur al tiuj kiuj interesiĝas. Troa fervoro en varbado nur aspektigas nin kiel religiajn fanatikulojn.

Mia kritiko do ne donas tute aliajn celojn kaj prioritatojn, sed proponas alian *emfazon* en la agado. Ni ne ĉesu pri varbado, sed ni redisponigu la fortojn pli al kvalito ene de la movado, kaj ni varbu alie. Ordinara homo eventuale interesiĝas lerni Esperanton por uzi ĝin, por ĝui ĝiajn apartajn eblecojn, sed ne por fariĝi mem varbanto de ankoraŭ novaj varbantoj. Mi pensas ke se ni tiel agas, la movado – iom paradokse – pli rapide kreskus, ol se ni plu koncentriĝus je varbado.

Bertilo Wennergren (Svedio)



Ĉe la inaŭguro de la Esperanto-muzeo parolas la israela ĉef-delegito Jehošua Tilleman; apud li sidas Moŝe Savir, fondinto kaj gvidanto de la muzeo. La adreso de la nova muzeo estas: Esperanto-Muzeo, Hebrea Universitato, Bejt Hillel, IL-91905 Jerusalemo.

ESPLORVOJAĜO TRA AZIO

La juna pola Cseh-instruisto Joachim Werdin komencis, la 29-an de decembro 1988, multmonatan vojaĝon tra la landoj de Azio. Per speciala aranĝo kun la revuo ESPERANTO, li regule raportos en niaj paĝoj pri siaj survojaj spertoj. Tiuj, kiuj volas kontakti lin dum lia vojaĝo, skribu al landaj asocioj aŭ ĉef-delegitoj laŭ la sekva skemo, kalkulante je pli longa restado en la landoj kun evoluantaj movadoj: (Israelo, Turkio), Irano, Pakistano, Bharato, Nepalo, Srilanko, Papua Novgvineo, Indonezio, Tajlando, Vjetnamio, Ĉinio, Suda Koreio, Japanio, Mongolio, Sovetunio.

Jen la unua Werdin-a "letero el Azio".

Intima, obstina movado en Israelo

Dum miaj tri semajnoj en "la sankta lando" mi povis renkonti preskaŭ ĉiujn aktivajn esperantistojn. "La ĉefa trajto de la movado en Israelo estas intimeco, ĉar la lando estas malgranda, ĉiuj aktivuloj konas unu la alian," konstatis Josef Ŝemer, la redaktoro de *Israela esperantisto* (aperanta trifoje en la jaro en kvanto de 500 ekzempleroj). Ĝuste dum nia interparolo li tenis la centan numeron. En la listo de kotizintoj por la jaro 1988 estas ĉirkaŭ 300 esperantistoj, informis min Eldad Salzmänn, la prezidanto de Junulara Esperanto-Ligo Israela (JELI) kaj eks-sekretario de Esperanto-Ligo en Israelo (ELI). JELI havas nun proksimume 70 membrojn, el kiuj la plej granda parto troviĝas en Telavivo – centro de la plej aktiva Esperanta agado. En la telaviva klubejo ĉiusemajne kolektiĝas inter 15 kaj 30 movadanoj.

Kvankam en ELI "oni ne vidas kreskon nombran" (Ŝemer), ĝiaj aktivuloj persistas kaj alportas sukcesojn. Eldone, ekzemple, aperis *Antologio de la hebrea poezio* de Josef Kohen-Cedek, vortaro de Josef Murĵan, *Salato* de Moŝe Savir, diversaj libroj kaj libretoj de Jeremi Gishron, kasedo *Israelaj kantoj*, kaj ankoraŭ kelkaj aliaj. Pli rezulton oni povas konstati en Jerusalemo, kie ĉe la Hebrea Universitato, en la konstruaĵo de la Fondaĵo Hillel de B'nai B'rith, inaŭguriĝis Esperanto-muzeo la 6-an de decembro 1988 (foto). Tie troviĝas jam, krom aliaj objektoj, kelkaj centoj da libroj kaj kelkaj miloj da gazetoj en Esperanto. La fondinto de la muzeo, Moŝe Savir, esperas fari ĝin la centra Esperanta librejo de Israelo; li krome aranĝis ekspozicion ĉe la universitato kaj nun gvidas kurson tie.

Al la du urboj Telavivo kaj Jerusalemo oni devas aldoni Hajfon, kie troviĝas la tria klubo en Israelo, grupo negranda kiel en Jerusalemo, kiu kunvenas neofte sed regule. En Hajfo krome situas la monda centro de la Bahaa Kredo. Tie mi gvidis kvin-tagan intensan Esperanto-kurson por entute 24 partoprenantoj. Krom tio mi ne povis multe kontribui al la movado; aperis artikolo en *The Jerusalem Post*, kaj en mia lasta restad-tago mi prelegis en lernejo pri Esperanto, varbante kelkajn studentojn.

En la planoj de ELI troviĝas "konstanta atako de amas-medioj" (-komunikiloj), laŭ la nuna prezidanto Amri Wandel, kaj "radia Esperanto-kurso" laŭ JELI-prezidanto Salzmänn. Kontaktoj kun la landa asocio de instruistoj kaj la edukministerio fruktis forme de letero, kiun la ministerio dissendis al siaj landaj filioj, pri la graveco kaj utileco de Esperanto. Supozeble tio helpas enkonduki instruadon de la lingvo en lernejojn. En kelkaj lernejoj, precipe en Telavivo, Esperanto jam estas instruata al klasoj de speciale kapablaj infanoj.

Joachim Werdin

Pri civilizaciaj minacoj dum la Jubilea Jaro

Antaŭ la nova jarmilo – ideoj por la vivo el mondo minacata. Paderborn: Esperanto-Centro, 1987. 534 p. 28,5 cm. Prezo: 52,80 gld.

En 1986 Wolfgang Gunther, Hermann Behrmann kaj Helmut Welger serĉis homojn, kiuj sendos al ili tradukajn aŭ originalajn tekstojn lige kun la gvidslogano “Por la vivo”. La anoncintoj celis kompili komunan libron de esperantistaro salute al la centjara jubileo. Naŭdek du kontribuajtoj de personoj loĝantaj en dudek sep landoj ebligis ties realigon. Aparte menciendas grava laboro, kiun faris Traduka Servo de Asocio de Verduloj Esperantistaj, liverante tre multajn tekstojn pri civilizaciaj problemoj de la nuntempo.

La ĉefaj ideoj, kiuj plektiĝas pli-malpli tra la tuta volumo, estas la neceso agi por tervastiĝo de la homa konscio kaj ekologiigi la homan aktivadon, anstataŭigi la antropocentran vidpunkton per la biocentra (naturo kiel sistemo kaj homo kiel ties ero). Ĉi-rilate mencieblas ekzemple *Gaia – la Tero kiel organismo* de J.E. Lovelock kaj Michael Alleby, *Hodiaŭaj mond-problemoj* de Carl Friedrich von Weizsäcker, *Novaj valoroj por ekonomio kaj politiko* de Johan Galtung, *Nia Tero antaŭ la jaro 2000* de Herbert Gruhl, *Mesaĝo al eŭropanoj: vekigu, la tekniko ne savos vin...* de John Mohawk (ĉiuj tradukitaj de AVE), *Biopolo – centro por soci-ekologio* de Ernst Bartels (tr. G.F. Makkink), *Pri la mortiga kompreno de la nocio neŭtraleco* de Wolfgang Gunther. Ŝajnas al mi, ke eventualaj interesiĝantoj jam havas sufiĉan signalon pri la ĉefa temvefto, kiu koncernas fundamentajn civilizaciajn minacojn: poluciadon de la naturo, rompadon de la natura ekvilibro, troloĝatecon, malsaton, atom-energiantan demandon. Mi do nur aldonas, ke el tutpaĝa anonco eblas informiĝi pri AVE.

Por multaj la gvidslogano estis instigo al malpli ĝenerala, sed same pensiga eldiro. Audrey Childs-Mee rimarkigis pri rigideco de plenkreskula pensado kaj montris kiom multe eblas lerni de infanoj. Ankaŭ Ghislaine Tillieux alprenis psikologian sintenon, indikante la vojon vastigi kaj pozitivigi la perceptadon de la mondo. Trevor Steele tradukis artikolon de Theodore Roszak pri la urbeca karaktero de intelektularo kiel socia tavolo. Kazimierz Szczurek rememorigis historion de aŭtodafeoj (ŝajne senfinan, ve!). Helmut Welger prezentis modernan aspekton de la homaranismo. Jacqueline Lépeix postulis likvidon de torturado kaj vastan socian kontrolon super la puninstancoj. Volker Matthies (tr. AVE) priskribis problemojn de elmigraj rifuĝintoj; ne mankis eĉ socia dimensio de sporto, per manifesto de fama argentina futbal-trejnistoj, Cesar Luis Menotti (tr. AVE).

Mi senhezite nomas la libron fascina, kaj pro la enhavo mem kaj pro la redakta linio. Rajtis kontribui ĉiuj dezirantoj – per propra aŭ traduka teksto. Dank’ al tio aŭtoroj esperantistaj kaj neesperantistaj najbaras, kaj – pli grave – internacie konataj intelektuloj apudas al privataj (ja Privat-aj!) homoj. Tio devigas la leganton al aktiva sinteno: kritika kribrado de ideoj, sen konsidero pri eventuala prestiĝo de homnomo, des pli ke kelkfoje “por la vivo” servas disopinioj aŭ rektaj kontraŭopinioj (ekz. pri naskolimigado aŭ senc-haveco de kosmosplorado).

Tre demokrate rilatis la redaktoroj al la lingvaĵo. Kvankam ekzistas enkonduka pardonpeto pro “malĝustaj korektaĵoj”, la tuto supozigas ke intervenoj ne multis. La leganto ricevas grandan provaĵon de relative kruda materialo por studi etnolingvajn influojn je Esperanto. (Sufiĉe multaj tajp-eraroj malfaciligas la taskon. Plurfoje estas malfacile diri ĉu foresto de -n estas intencata aŭ hazarda, ĉu -a eble estis -e, ktp.) Mi rimarkis gravan influon de la angla leksiko je la Esperanta, kelkloke eĉ danĝeran (*medio*, *kosto*, *akcio* en la senco de *komunikilo*, *bordo*, *kampanjo*). Mi ne plendas per tio kontraŭ kaloĉajecaj neologismoj: ĉi-specaj pruntaĵoj aperas rezulte de *nekonscia agado*. Mi opinias, ke eĉ liberala redaktoro forsarku la eksterPIVajojn kiuj konfuzas, kaj glosu la ceterajn (kvankam la tasko necesigas hercule laboreman maŝinon, ne homon).

Mi revenu al la enhavo. La esencon de la libro por mi mem konsistigas tri tekstoj. Josef Grün kaj Detlev Wiener per “Mondmodeloj – atingoj kaj danĝeroj de komputilapogita futurologio” (tr. AVE) avertas, ke rezultoj de ĉiutendencaj futurologiaj prognozoj grave dependas de la esploristaj premisoj. Utiligo de komputiloj ne ŝanĝas la situacion ĉi-rilate. “Objektive sciencaj” antaŭdiroj konfirmiĝas nur limigite, se entute. Tial – observante sen neglekto kaj kun timo la farojn de socigvidantoj kaj moviĝon de grupegoj – oni plie fidu al la povo de unuopulo. John Papworth en “La kvara mondo – loka potenco por paco” (tr. Anica Page) tuŝas ĝuste ĉi tiun problemon, postulante konservon de aŭtentaj memregaj mekanismoj en relative malgrandaj homgrupoj, spite la econ de sistemoj al tutiĝo en ĉiam pli grandajn unuojn. Necesas por tio celkonscio en la agado. Imitindan ekzemplon de prudenta unuopula agado prezentas Gregory Bateson en “La ekologia horloĝo” (tr. AVE).

Panoramo kaj trezorminejo

La fenomeno Esperanto. William Auld. Roterdamo: UEA, 1988. 120 p. 21 cm. Prezo: 18,00 gld. (triona rabato)


Per sia decido inviti William Auld, lige kun la jarcentiĝo de Esperanto, verki libron kun superrigardo pri la cirkonstancoj kiel naskiĝis kaj vivantiĝis tiu lingva fenomeno kaj kiel elvolviĝis ĝiaj unuaj cent jaroj, UEA sciis trovi ĝustan homon por plenumi tiun nefacilan taskon. Auld – fundamente poeto, sed ankaŭ eseisto, kritikisto, antologiisto, redaktoro, okupinto de ŝlosilaj kulturpostenoj en la movado, kaj aldone edukisto – donis al ni unikan panoramon pri tiu fenomeno, en klara, travidebla prozo. Nur homo tiel dotita kaj spertoriĉa, kia Auld, en kiu cetere la fenomeno Esperanto simbioziĝis kun liaj intelektaj kapabloj kaj kun liaj afekcioj, povis prezenti tiel brilan intelektan produkton. La libro konsistas el naŭ pli-malpli longaj ĉapitroj, nome: 1. La problemoj; 2. La solvo: teorie; 3. La solvo: praktike; 4. La lingvo Esperanto; 5. Tre konciza historio de la Esperanto-Movado; 6. “Limigita kaj artefarita literaturo”; 7. Kiel utiligi ĝin?; 8. Kultura demando; kaj 9. tri apendicoj, unu el ili la parolado de Zamenhof ĉe la Unua Kongreso de Esperanto.

La tuta libro, ĉefe la ĉapitro “La lingvo Esperanto”, estas minejo de kleraj konstatoj. Ekz-e sur paĝo 33, en kunteksto pri la radiktrezoro de nia lingvo, Auld asertas: “Oni devas kompreni, ke la radikoj ne estas vortoj. Ili estas la materialo, el kiu la vortoj estas konstruitaj.” Nu, ĉu Esperanto estas lingvo sen vortoj? Tute ne! Sed Zamenhof, genie, lasis la vortokonstruadon al la libereco kaj bontrovo de la lingvouzantoj, kondiĉ

Kiam oni konstruis kolezion en Oksfordo, oni plantis kverkojn servontajn kiel "lignotenejo" por iama interŝanĝo de portotrajtoj en la tegmento. La tieaj arbaristoj transdonis de generacio al generacio mesaĝon pri la destino de la kverkoj, kune kun la ordono gardi ilin. La destino de la arboj plenumiĝis post 400 jaroj (!). Estus bone, se ni ĉiam pensus almenaŭ tiom longtempe kaj naturkonforme pri niaj propraj faroj...

Mi ĝojas, ke almenaŭ per recenzo mi kontribuetas al la volumo; siatempe mi perdis la ŝancon pro aĉa mallaboremo. Ĉi tiu libro estas certe unu el la plej firmaj kaj konkretaj prezentiĝoj de la esperantistaro en la jaro de nia bruegeta jubileo.

Wojciech Usakiewicz (Pollando)



Kiel vastigi kaj pozitivigi la perceptadon de la mondo?

memkompreneble, ke tiu libera bontrovo ne kontraŭas la Fundamenton de Esperanto. Auld donas belan ekzemplon, kiun mi legis por la unua fojo en viva literaturo, pri la libero krei novajn vortojn: li epitetas "samseksemulojn" per la pure Esperanta vorto *malgeaj*; la vorto *incitnudiĝo* same proklamas la kunmetkapablon de Esperanto. Sur paĝo 36 ni trovas plurajn ekzemplojn pri sintezaj kaj analizaj aspektoj de Esperanto: *virino en longa jupo* = *virino longjupa* ktp, ĝis la karikaturspekta (tamen Esperanta!) *figemalafablulinidetaĉoj*, analize: "abomenindaj malgrandaj buboj kaj bubinoj, infanoj de virino ne societema" (p. 44). La libro svarmas je elvolvado de latentaj. Plurloke mi – kaj kiel mi certe multaj aliaj – ŝatintus trovi pli ampleksajn disvolviĝojn de pluraj punktoj.

Auld emfazas la gravon de la *Hamlet*-traduko fare de Zamenhof por la vivantigo de nia beletra lingvo. Li aludas la fakton, ke Esperanto kreas siajn vortojn per la ludado de siaj kunmetaj kaj analizaj procedoj – procedoj, kiujn Auld bele ekspluatadas en sia propra verklingvaĵo. Kaj li aldonas – eble unu el liaj plej penetraj asertoj – ke Esperanto jam kreis al si propran *etoson*, reflektado de propra kultura mondo: aserto, kiun li marteladas jam de multaj jaroj.

Al mi estis granda plezuro legi tiun ĉi libron de Auld, en kiu mi ne scias kion pli admiri: ĉu lian helan verkstilon farĉitan de poeziaĵoj, ĉu lian profundan amon kaj senkondiĉan respekton al nia kulturo. Ĉiu el tiuj aspektoj estas aparte eminenta: ĉiuj kune faras la libron de Auld nemalhavebla atuto de nia lingva sociologio.

J. Régulo (Kanariaj Insuloj)

Lerta bildigo de la filmfarado

En la mirinda mondo de la kino (1971). Donĉo Ĥitrov. El la bulgara tradukis la verkisto. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 212 p. 17 cm. Broŝurita, ilustrita. ISBN 963-571-157-3. Prezo: 7,50 gld.

En dupaĝa enkonduko, la verkisto simple kaj rekte klarigas la titolon de sia libro. Je la aĝo de ses jaroj, li unuafoje eniris tiun mirindan mondon, kaj ĝi restas same magia por li trans la jaroj de laboro en kinematografio. Same klara estas lia celo: li dediĉas sian libron "al la junaj legantoj – la plej ardaĵ ŝatantoj de la kino", kun la espero ke ili ŝatos lerni pri la procezo kiu kreas tiun mondon. Kiel lerta reĝisoro, li konstruas el informo kaj fantazio fluantan rakonton kiu bildigas multajn facetojn de la moderna filmfarado.

Tri historioj disvolviĝas sur la scenejo. En la centro estas Velizar. Li taksas sin normala lerneĵano, ĝis tago kiam oni elektas lin, kun kelkaj samklasanoj, aktori en filmo pri junuloj. Ni sekvas lin, kaj lernas kun li pri la tre longdaŭra, kompleksa procezo de filmado. La graveco de la scenaro, la strangeco de ŝminkado, la mirakloj de la teknikistoj, kaj ĉiuj aliaj paŝoj montriĝas tra la spertoj de tiu nova aktoro. Ni ekkomprenas la malfacilaĵojn, kiujn junulo spertas, kiu devas fordoni ĉiun liberan momenton al tia projekto, kaj ankoraŭ sekvi normalan studprogramon. Ne estas tute plaĉa afero, nia heroo iom surprize konstatas. Sed tre interesa. Velizar rakontas al ni la intrigon de sia filmo. Grupo de infanoj, "La Aŭdacaj Plumoj", kaŝe eldonas ĵurnalon, per kiu ili pririkanas kanajlojn, teruras trompistojn, ŝancelas ŝtelistojn, kaj ĝenerale plibonigas la kvartalon. La identiĝo de la junaj aktoroj kun siaj roloj aldonas spicon al la filma laboro kaj same efikas por la leganto. Tiujn du historiojn Velizar prezentas al sia amiko, la verkisto, kiu dum paŭzoj pli detale priskribas elementojn de la filmado kaj aldonas historion kaj evoluon de la kino. Tiuj tri rakontoj interplekte donas kompletan bildon de la plej nova arto.

Post la rakonto aperas "Konciza filma terminaro". Ĝi estas ne nur gloso de la terminoj kiuj aperas en la libro, sed ankaŭ "unua paŝo al pli ampleksa Esperanta filmterminaro". Kvankam mi ne ĉiun elekton ŝatas – *transfokatoro*, ekzemple, ne estas plibonigo de *vario-objektivo*, kiu listiĝas interkrampe – mi laŭdas lian klopodon, kaj subtenas lian peton de plibonigoj kaj aldonoj.

Ĥitrov diras ke "La plej granda rekompenco por mi estus, se mia libro atingus la junajn legantojn kaj plaĉus al ili." Pensante pri tiu celo dum mi legis la libron, mi certas ke juna filmamanto ŝatus ĝin. Ĝi ne vere estas libro por mezaĝulo kiel mi. Sed mi ĝuis ĉiun vorton.

Derek Roff (Usono)

Aŭdaco sola ne sufiĉas

La nova paradigmo en psikologio. Ruben Feldman González. Laroque Timbaut: SAT-Broŝurservo, 1985. 259 p. 21 cm. Prezo: 15,60 gld.

Ĉi tiu libro de kolego Feldman González embarasis min almenaŭ kvarfoje. Unue mi respondis antaŭ kelkaj jaroj la alvokon de s-ro Feldman, kiu serĉis tradukantojn por sia libro – kaj ne ricevis respondon. Due mi aĉetis kaj legis la libron pro pura fakintereso la unuan fojon, kaj ĝin ne komprenis. Trie mi ĝin ricevis por recenzo en nia oficiala organo, ĝin relegis, kaj

same ne kaptis la mesaĝon de la aŭtoro. Kvare mi nun verkas recenzaĵon en stato de embarasiĝo.

Aliflanke min fascinis kaj fascinas la kuraĝo de la aŭtoro pritrakti temojn absolute originalajn kaj aktualajn, kiujn la tradicie pensantaj reprezentantoj de mia fako (mi estas psikiatro kaj psikoterapiisto) ordinarie evitas. Des pli, ke li aŭdacas paradigumumi, t.e. kunigi diversajn teoriojn al pli alta nivelo, al nova kvalito.

La esenco de la nova paradigmo estas du aferoj, kiuj rezultas el la demandoj: "Kio estas la menso? Ĉu ĝi estas propreco eliranta de la interagado inter organismo kaj ĝia medio? Aŭ ĉu ĝi estas reflektado de la baza organizo de la universo?" (p. 4) Laŭ la aŭtoro, kiu kelkloke signalas esti adepto de Jiddu Krishnamurti, respondo donas la koncepto pri unueca perceptado. "La unueca perceptado, kiu iugrade estas la integrita agado de la kvin sensoj, estas la ponto inter ambaŭ agoj de la menso: 1. la menso kiel duala propreco emerĝanta de la interrilato inter organismo kaj ĝia medio (kion ni nomas procezo META), kaj 2. la menso kiel reflektado de la holokinetiko (kion ni nomas *karyon* aŭ kerno)." (p. 4)

Sur la paĝoj de la libro svarmas abundegaj informoj freŝdataj kaj sciencaj, kiuj pruvas la multflankan kaj vastan scion de la

aŭtoro. Li lertas kunligi ekkonojn el plej diversaj sferoj kun sia temo. Trans multaj paĝoj li respondas al demandoj. Ĉio ŝajnas al mi servi al la celo, konvinki la leganton kaj klarigi la koncepton, kiu tamen de paĝo al paĝo pli malklariĝas.

Jen la granda malvirto de la verko. Mankas al ĝi sistemeco kaj didaktika konstruo. La libro estas kvazaŭ senstruktura, kelkfoje ĥaosa rilate la gvidan ideon. Tio estas des pli bedaŭrinda, ĉar ĝi aliel estas unikaĵo en la pozitiva senco de la vorto sur nia libromarkato. Diversajn fakajn malĝustaĵojn (ekz. sur p. 21 la fenomeno "deĵa-vu" ne estas korekte prezentita) aŭ nebazitajn spekulaciojn (ekz. sur p. 40/41 pri la ligoj inter la Neandertal-homoj kaj la procezo META) mi volonte akceptus, eĉ la abundajn lingvajn malglataĵojn (ekz. la ĝena mikso de *ricevi/akcepti*) – se finfine la celo de la aŭtoro estus atingita. Sed tiel ne estas.... La "tuteca" karaktero kaj la specifa kvalito de mensaj procedoj kaj speciale la transcenda karaktero de la bazaj ideoj de s-ro Feldman, laŭ mi malebligas la priskribon per natursciencaj metodoj kaj raciaj vortoj, ĉar ili ne taŭgas por fine spiritalaj fenomenoj. Restas do la fatala sento, ke la aŭtoro tro fervore kaj tro haste volis atingi la sciencistaron per siaj ideoj. Kaj tion malgraŭ la propra eldiro (p.10): "Eble la plej bona maniero difini la psikologian kernon estas resti silenta."

Hans Eichhorn (Germana DR)

Voko al kreiveco


Infoduktoj. Nova vorto, nova futuro. Luc De Brabandere. Roterdamo: UEA/BSO, 1988. 142 p. 21 cm. Prezo: 30,00 gld.; triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Tiu scienca libro montras la gravecon de la informoj: la portantoj de la tria industria revolucio, post tiuj de la materio kaj la energio. Ĝi estas vere bonvena ĉar baza kaj kleriga; ĝi enhavas, en simpla lingvo, multajn informojn nemalhaveblajn por kompreni la nunan situacion laŭ socia kaj teknika vidpunktoj sur la informadikaj kaj telekomunikaj kampoj, kaj por antaŭvidi la estontan evoluon sur tiuj kampoj.

La rolo de la informadiko kreskos kun la progreso de la teknologio sur tri kampoj: la transsendo de informoj, ilia prilaboro, kaj ilia registro. La diĝitigo de informoj aplikiĝas al pli kaj pli da kampoj (teksto, sonoj, televido kaj senmovaj bildoj). La kvina-generaciaj komputiloj devus vidi, aŭdi kaj paroli same kiel la homoj. La artefarita intelekto devus alporti solvon al problemoj ne solveblaj per tradicia informadiko. La aplikokampoj de informadiko pli kaj pli vastiĝas helpe de mikrocirkvitoj kaj de telekomunikaj retoj.

Post teknika prezento de informadiko, la aŭtoro analizas ankaŭ la sociajn aspektojn de la informsocio. Ne ekzistas neŭtrala informadiko: kaze de striko en la poŝtaj kaj telekomunikaj servoj, la leteroj haltas sed la telefono daŭre funkcias. Kiun rolon havas la doganaro en la mondo de internacia telekomunikado? Informoj povas esti kaj utilaj kaj danĝeraj. Telekomunikaj retoj povas ankaŭ alporti izoligon (personoj restas antaŭ elektronikaj aparatoj kiaj terminalo aŭ televidilo kaj ne plu parole dialogas).

Informadiko aŭtomatigas pli kaj pli da taskoj, ĝi plilongigos la librempon. Informadiko kaj telekomunikado fariĝas strategiaj iloj por la entreprenoj kaj la landoj. Niaj sociaj strukturoj devus evolui por akompani tiun revolucion; pro tio nia kreiveco estas tre grava ĉar informadiko ne kapablas solvi la sociajn problemojn. Trovi solvojn al tiuj problemoj estas ankaŭ ŝanco de la malgrandaj landoj.



"La kubo de infoduktoj" montras la kompleksecon de la novaj informaj teknologioj, kiuj eble estos kunigitaj en integran servosistemon antaŭ la fino de la jarcento. Kiajn eblojn tio donos por la internacia solvado de tutmondaj problemoj, kaj kiel rolos Esperanto en tio?

Jen aktuala kaj pensiga libro en la ĝenro "populara scienco", kiu vere indus tradukon en Esperanton kaj respondas al vera bezono. Gratulojn al la tradukintoj kaj al la eldoninto kiuj, en rekorda tempo, liveris al la Esperanta publiko tiun libron. Tio tre gravas por antaŭvida verko, kaj ankaŭ montras la kapablon de la esperantistaj fakuloj.

Christian Bertin (Francio)

Ĉi-monate aperas ankau kelkaj malnovaj titoloj, kiuj laŭ nia komputila registro neniam eniris ĉi tiun rubrikon sed daŭre haveblas de la Libroservo.

Andromaka. Jean Racine (1639-1699). El la franca trad. Georges Lagrange. Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1988. 72p. ISSN 0775-7698. 21cm. Klasika dramo inspirita de la helena mitologio, pri la tragedia sorto de kelkaj ĉefroluloj post la Troja Milito. 8,10 gld.

Ekologio. Div. aŭtoroj, red. Philippe Cousson. Poitiers Cedex: Evangeliaj kajeroj 2, 1987. 88p. 21cm. Varia, plejparte kristana esearo pri la rilato homo-naturo. 10,20 gld.

El diversaj lingvoj. Esperanto leer-leesboek. A.G.J. van Straaten. Nijmegen: Centrale Esperanto Propaganda Commissie, 1935. 180p. 24cm. Lego- kaj lernolibro por nederlandlingvaj aŭtodidaktaj. 9,00 gld.

En la tombo (1892). Nikolaj A. Borovko. Posteseeto de Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 20p. 21cm. Frua originala rakonto pri viva entombigo. 6,30 gld.

En ombro kaj en lumo. Mediuma verko. Zilda Gama. El la portugala trad. L.C. Porto Carreiro Neto. Rio-de-Janeiro: Federação Espírita Brasileira, 1957. 274p. 18cm. Flu-stila romano pri la amo, la morto kaj la transmorta mondo, laŭ la aŭtoro diktita de la spirito de la franca verkisto Victor Hugo. 12,00 gld.

Generalo Kozo. A. Lopez Luna. Prezento de Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1988. 70p. ISBN 950-43-2056-2. 22cm. Satira biografio de diktatora militisto en la fikcia Tarsa Respubliko. 9,00 gld.

Interlingvistika Tartuensis V. Interlingvistiĉeskaja teorija i praktika mejdunarodnogo vspomogateljnogo jazyka. Red. A. Duliĉenko. Tartu: Tartuskij Gosudarstvennyj Universitet, 1988. 184p. ISSN 0494-7304 0234-7911. 22cm. Ruslingvaj interlingvistikaj eseoj kun resumoj en Esperanto. 18,00 gld.

Jugoslavia komunista partio inter la du mondmilitoj (1977). Josip Broz Tito (1892-1980). El la serbokroata trad. Senad Ĉolić. Beogrado-Sarajevo: Jugoslavia Esperanto-Ligo, 1988. 80p. 20cm. 12,00 gld.

Neĝhomo. Tibor Sekelj. Germanlingvaj glosoj de Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 20p. 21cm. Rakonto pri travivaĵo dum montgrimpado. 6,30 gld.

Soifo. Ivo Andrić. El la serbokroata trad. Ladislav Režek, rev. Lucija Borčić. Sarajevo: Savez za esperanto BiH, 1988. 64p. 16cm. Kvin noveloj de la bosnia nobelpremiito, simplaj senvualaj rakontoj pri la homaj pasioj. 9,00 gld.

Spiritismo kaj homfaritaj religioj. Nassif Isaac. Rio-de-Janeiro: Spirita Eldona Societo F. Lorenz, 1988. 55p. 21cm. Argumentoj por spiritismo kompare al la kristana kaj islama kredoj. 3,00 gld.

Ŝanco por feliĉo. Phil Bosmans. El la nederlanda trad. Lydia Kerremans. Tiel: Lannoo, 1988. 93p. ISBN 90 209 1528. 21cm. Ilus. Humanisma vivfilozofio de la fondinto de "Movado sen Nomo". 12,00 gld.

Turstrato 4 (1934). Hans Weinhengst. Postparolo de Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1988 (represo). 176p. ISSN 0933-7199. 21cm. Realisma originala romano pri la "viktimoj de kruela soci-ordo kontraŭ kiu ili ne ribelas". 36,00 gld.

Vimala Thakar. La 6a parolado, 14 aŭgusto 1987, "Bovendonk", Hoeven, NL. El la angla trad. Albert Goodheir kaj Kees de Boer. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1988. 40p. 21cm. Pri la transformo de la homa psiko per meditado kaj spiriteca rilato al la mondo (dulingva eldono). 7,50 gld.

DIVERSAĴOJ

Albumo: Bestetoj, bestegoj, bestaĉoj. Albumo, Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo k.a., 1983 (neindikita). 10p. 30cm. Kovrilo por la samtitola disko, aparte aĉetebla kiel kantlibro. Simplaj ilustritaj versaĵoj por lernantoj. 7,50 gld.

Disko: Flávio Fonseca kantas en Esperanto. Brasília: Esperanto-Asocio de Brasília, 1986. 18cm. Kvar popularaj kantoj laŭ latinamerika stilo. 9,30 gld.

Filatelaĵo Ĉinio: Koverta de la 1-a Ĉina Kongreso de Esperanto 1985. Stampita. 4,50 gld.

Filatelaĵo Ĉinio: Poŝtkarto Draka Jaro. Stampita, 1988-1-5. 4,50 gld.

Filatelaĵo Ĉinio: Unuataga koverta 71-a UK. Stampita, 1986. 4,50 gld.

Filatelaĵo Ĉinio: Unuataga koverta Cai Yuanpei. Stampita, 1988-1-11. Eldonita por la 120-a naskiĝdatreveno de revolucia edukisto kaj subtenanto de Esperanto. 4,50 gld.

Filatelaĵo Ĉinio: Unuataga koverta Draka Jaro. Stampita, 1988-1-5. Dorsa klarigo en la ĉina kaj Esperanto. 4,50 gld.



Akompane al inundo de filatelaĵoj el Ĉinio, Ĉina E-Eldonejo produktis belan kaj kompletan katalogon de poŝtmarkoj.

Glumarko Brajtono. 5x4cm. Simbolo por la 74-a UK, 1989. 3,60 gld. por folio de 16 glumarkoj.

Kasedo: Por marto. Div. aŭtoroj. Kantas Akiko Tanaka, Hiromi Kawamoto, Hirosi Nobukuni. Komponis Hirosi Nobukuni. Tokio: Tokia Esperanto-Kooperativo, 1987. 44-minuta. Originalaj lirikaj kantoj, kun tekstoj de J. Baghy k.a. 23,70 gld.

Kurso de Esperanto. Komplete por instruisto – Demandoj kaj respondoj + gramatikaj klarigoj. Antonije kaj Tibor Sekelj. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1988. 108p. 30cm. Laŭ aŭdvida struktura metodo. 24,00 gld.

Kurso de Esperanto. Komplete por instruisto sen demandoj kaj respondoj + gramatikaj klarigoj. Antonije kaj Tibor Sekelj. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1988. 56p. 30cm. Laŭ aŭdvida struktura metodo. 21,00 gld.

Kurso de Esperanto. Komplete por lernanto. Antonije kaj Tibor Sekelj. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1988. 46p. 30cm. Laŭ aŭdvida struktura metodo. Bildstrioj. 15,00 gld.

Pluvombrelo. Malhelblua kun dufoje la blanka vorto *esperanto*. 24,00 gld.

Vidbendo: Esperanto. Ĉefreĝ. Roman Dobrzyński. Varsovio: Interpress-Film, 1987. VHS-PAL. 60-minuta. Profesia dokumenta filmo, kiu montras la praktikan funkciadon de Esperanto en tri kontinentoj kaj donas bazajn informojn pri la movado. 75,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Nekrologoj

HANS BAKKER (patro) (1896-1988), dum pli ol 50 jaroj delegito aŭ fakdelegito de UEA, mortis la 3-an de decembro en Amsterdamo, Nederlando. Lerninte Esperanton antaŭ ĉ. 60 jaroj, li pere de ĝi edziĝis kaj poste klopodis utiligi ĝin en sia profesio, turismo. Liaj streboj alportis plurajn sukcesojn, i.a. esperantigon de la nederlandaj telefonbudoj kaj la menuoj de la eŭropaj fervojaj restoracioj *Wagons-Lits*. La ekskursoj de la harlema UK en 1954 estis krome sub lia gvido. Li montriĝis ankaŭ talenta instruisto kaj informanto, kiu per trafaj, simplaj kaj amuzaj ilustraĵoj efike transdonis principojn kaj ideojn, i.a. en pluraj lernolibroj.

NIKOLAJ DANOVSKIJ (1905-1988), unu el la plej aktivaj sovetiaj tradukistoj kaj verkistoj en Esperanto post la dua mondmilito (kaj travivinto de la stalinaj persekutoj) forpasis la 2-an de majo 1988 en Riga, Latvio. Profesia inĝeniero kaj ĵurnalisto, li longe laboris en la redakcio de la Granda Sovetia Enciklopedio kiel supera scienca redaktoro. Samtempe li produktis ŝajne senfinan vicon da artikoloj, eseoj, tradukoj de ŝtataj dokumentoj kaj beletraĵoj, sovetiaj numeroj de *Paco* kaj Esperantaj versioj de kvar


filmoj. En 1986 aperis lia longe prilaborita monografio *Vvodnoe slovo v iskusstvo perevoda* (Enkonduka vorto pri la arto traduki).

ÁLVARO FAUSTO DE SOUZA (1929-1988) mortis la 3-an de aŭgusto 1988 en Rio-de-Janeiro, Brazilo, kie li estis fakdelegito pri geriatrico kaj medicino.

JOÃO DE OLIVEIRA GAMA (1909-1987), fakdelegito pri turismo, forpasis la 12-an de aprilo 1987 en Juiz de Fora, Brazilo.

LEONARD IVOR GENTLE, dumviva membro de UEA, forpasis pasintjare en Londono, Britio.

JIŘÍ KORINEK (1906-1988), konsterne produktiva tradukinto el la ĉeĥa literaturo, mortis la 4-an de novembro 1988 en Ústí nad Labem, Ĉeĥoslovakio. Profesie teksaĵisto, esperantisto de 1922, li plej laste en la Régulo-festlibro *Esperantismo* taksis sian verkaron kiel 500 originalajn kaj 550 tradukitajn poemojn kaj muziktekstojn. Nur ono el tio aperis libroforme: i.a. *Panjo* de Seifert (1960), *Sileziaj*



kantoj de Bezruč (1970), la propra *Vitreroj* (1976), *Flugilhava ŝtono* de Karen (1985) kaj *Sur la sojlo de la amo* de Procházková (1986). Li havas ankaŭ lokon en *Esperanta antologio* (1984) kaj en multaj revuoj, i.a. kiel gajninto de 18 literaturaj premioj. Nur du semajnojn antaŭ la morto Jiří Korinek fariĝis la unua esperantisto, kiun la ĉeĥa ŝtato honorigis kiel "merithavan laboranton en kulturo" (vidu foton supre).

PAULO PAAVALI (1914-1988), ĉefepiskopo de la finna ortodoksa eklezio de 1960 ĝis 1987, forpasis la 2-an de decembro en Kuopio. Siatempe membro de UEA, li i.a. aranĝis aperigon de Esperanta prospekto pri la Ortodoksa eklezia muzeo de Kuopio.

NIKU TUMI (1911-1988) mortis en Tampere la 31-an de oktobro. Li estis iama sekretario-kasisto de la finna ILEI-sekcio, kaj de 1963 ĝis 1969 redaktoro de la porlernejana revuo *Planteto*, kiun li mem fondis kaj presis.

AALTJE VROLIJK-HEMELMAN (1911-1988) forpasis la 15-an de decembro en Almelo, Nederlando. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj la delegito en Almelo.

BERNARD ZENKER (1907-1989) mortis la 28-an de oktobro en Hanau, FR Germanio, kie dum 17 jaroj li estis delegito. Esperantisto de 1920, li okupis kelkajn gravajn postenojn en la antaŭmilita movado ĝis ties ĉesigo fare de la nazia reĝimo. Post la milito li aktivis i.a. kiel la prezidanto de regiona asocio, kaj pri la gazetara servo de GEA kaj la esperantigo de popularaj kantoj.



JOHN BROWNLEE (1911-1988), la multjara inspiranto de la Londona Esperanto-Horo kaj dumviva membro de UEA, mortis la 28-an de septembro en Reading, Anglio. Li eklermis Esperanton tridekjara, kaj post la fino de la dua mondmilito estis konstante aktiva en la movado en pluraj regionoj de Anglio, ankaŭ kiel UEA-delegito kaj fakdelegito. Dum 21 jaroj li oficis kiel la sekretario de Esperanto-Asocio de Britio. Inter liaj multaj esencaj taskoj estis la administrado de librofonduso por la E-movadoj de la tria mondo, kiu de post lia morto portas lian nomon. En la supra foto (unua vico, dekstre) bildiĝas lia vigla akordiana akompanado de la Ĥoro.

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn – sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Alvokoj por solidareco

Mi salutas vin en la nomo de Nika-ragva Esperanto-Asocio. Ni tre multe dankas al la esperantistaro kiu helpis nin ĉi-jare: Klemens Broekma kaj Jacques Tuinder de Nederlando, Carl-Olof Sandgren de Svedio, S. Yamazoe de Japanio, Bulgara Esperanto-Asocio, kaj aliaj esperantistoj kiuj skribis montrante sian amikecon kaj solidarecon kun ni.

Vi certe aŭdis per televido aŭ ĵurnalo pri la granda katastrofo en nia lando pro uragano Johana. Se iuj esperantistoj deziras montri sian solidarecon kun la viktimoj, ni peros ĉian ajn helpon al ili. Tio estas bona ŝanco, por ke Esperanto estu utila en tiu malfeliĉa horo.

José Dolores Gaitán
Sekretario, NEA
Apartado 3912
Managua 5, Nikaragvo

Ni, membroj de la moskva E-kooperativo "Kopso", impresegitaj de la tragediaj eventoj en Armenio, alvokas ĉiujn Esperantajn unuiĝojn, asociojn, klubojn kaj unuopulojn helpi la armenan popolon per mono, aĵoj aŭ alimaniere.

La membroj de "Kopso" ĝiras sian unusemajnan lukron al la fonduso por helpo al Armenio.

Stanislav Koncebovski
E-kooperativo "Kopso"
Birjulevskaja str. 53, kor. 1
SU-115372 Moskvo, Sovetunio

Prilabori semojn, ne arbojn

Estas tro optimisme atendi kiel s-ino Bijleveld (p. 219 de la decembra numero) pri la Olimpikoj en Barcelono, ke "en ĉiuj landoj la esperantistoj serĉos la partoprenontojn en tiuj Olimpikoj kaj instruos Esperanton al ili". La naciaj olimpikaj komitatoj nomumos la partoprenontojn last-momente, nur kelkajn semajnojn antaŭ la ludoj. En tiuj lastaj semajnoj la

atletoj havos tempon nur por trejnado.

Ankaŭ pri tiuj pintaj sportistoj, kiuj plej verŝajne estos elektitaj, ne indas okupiĝi, ĉar en ilia vivo apenaŭ restas tempo por alio ol trejnado kaj konkuro.

Oni pensu pri la sporta mondo ĝenerale, pri gejunuloj kiuj ankoraŭ ne estas pintuloj, kaj pri iliaj asocioj. Anstataŭ la tujsekvaj, ni celu postajn Olimpikojn. Kaj ni pretigu terminarojn pri unuopaj sportoj, aperigu sportan gazeton, kaj esperu ke la onidire fondita sporta E-ligo ne tro longe kaŝu sin.

Osmo Buller (Finnlando)

Ne estis tiel komplike...

En la decembra numero s-ro Pirlot plendis pri la malfrua apero de la broŝureto de Amnestio Internacia. Miaopinie tute prave, sed ke li krome plendas ke UEA ne aldonis sugestojn kiel *agi* – nu, tion mi ne komprenas. La broŝureto ja estis sufiĉe klara... Persone mi kolektis en deko da tagoj plurajn centojn da subskriboj. Espreble aliaj agis same.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Pli bone fuŝe ol forpuŝe

Ĉu ordinara esperantisto rajtas aldoni komenton en la diskuti pri la preciza uzo de nia lingvo?...

Antaŭnelonge mi estis en Tunizio. Nia plej ŝatata (arablingva) gvidisto faris sian komenton en tri lingvoj – la angla, franca kaj germana. Li parolis flue kaj klare, kaj ni komprenis, eĉ kiam li diris (anglalingve): "Ili sin lavas antaŭ ĉiu preĝi." Tio estas eraro, tamen tute ne grava eraro. Lia intenco estis doni al ni informon, kaj li ĉiam sukcesis malgraŭ eraretoj.

Mi esperas, ke mia uzo de la internacia lingvo (kaj de la gepatra) pliboniĝas tagon post tago, kaj por helpi tion, mi legas la lingvon kaj uzas ĝin plejeble. Tamen, mia opinio restas, ke estas prefere uzi lingvon eĉ fuŝe, ol ne uzi ĝin pro timo fari erarojn.

Maurice Bale (Britio)

Du kazinskaj leteroj pri *baldi* kaj *malbaldi*

Tiu okazaĵo kun Baldas el Afriko (septembro, p. 160) kaj V. Seguru el Sovetunio (oktobro, p. 167) estas bona

ekzemplo kiamaniere oni povas tuj mondscale enkonduki novajn vortojn en nia leksikono. Mi persone jam fiksas tiujn du novajn vortojn en mia memoro... Laŭ mia opinio por la Akademio de Esperanto nun nur restas oficiale akcepti tiujn ĉi du novajn vortojn kaj rekomendi ilin por la tutmonda uzo.

Yvars Barŝevski (Sovetunio)

Red.: La uzo mem decidis, sed *seguri* ne ŝajnas tiel oportuna, kiel la sekva sugesto...

Ĉu *kazinski* signifas "malbaldi"? En la septembra numero de *Esperanto*, proksime al la kongresero "Baldas fruis 43 tagojn", en kiu vi klarigis ke *baldi* signifas "veni tro frue ien", Stafeto reklamas sian novan romanon: *Kazinski venas tro malfrue*. Amuze, ĉu ne?

F. Lo Jacomo (Francio)

Ĉu vesti aŭ malvesti, tiel staras la demando

Kun fiero aŭ fi-ero s-ro Alberto Menabene anoncas en la novjara numero de *Esperanto*, ke la fama aŭ fifama porno-stelulino Ilona Staller, la Ĉiĉolina, fariĝis verdstelulino. Eble laŭ niaj italaj samideanoj aŭ samilonanoj nia nova entreprenema subtenanto estas populara en Italio, sed ekster Italio ne ĉiuj konsideras ke ŝia profesio am-uza estas amuza. Mi vere timas ke cica batalanto kiel ambasadorino por niaj pacaj batalantoj malestimigas nian movadon en la okuloj de aliaj....

Eskil Svane (Francio)

Vana kverelo

En *Esperanto* 1988/p. 74 G. Berveling pledas por "mi vidis, ke li alvenas" anstataŭ: "ke li alvenis"; kaj en 1988/p. 201 R. Ŝulco same firme pledas por "ke li alvenis" kiel la sola ĝusta formo.

Efektive, ambaŭ povas esti pravaj. Dependas de tio, kion oni volas diri, alivorte, ĉi-kaze kion diras la originala teksto. Sed pri tio la legantoj ne informiĝis kaj do ne povas juĝi, kiu pravas. Se vi diras: "mi vidis, ke li alvenis", tio signifas, ke *li jam estis alveninta al la loko*, kiam vi vidis lin; kaj se vi diras: "ke li alvenas", tio signifas ke vi vidis *lian alvenon al la loko*.

Ne nur laŭ PAG tiu lingvouzo estas ordinara, sed ĝi ankaŭ apartenas al la elementa lernolibro. Validas regulo kiel ĉe nerekta parolo.

E.A. Haugen (Norvegio)

• **Brazilo:** Vizitantoj al la ĉefkazerne de la brazila armeo povas nun informi sin pere de Esperanta faldfolio, kiu prezentas la konstruon de la kazerno kaj la celojn de la armeo. Ekzemplerojn petu ĉe Centro de Comunicacao Social do Exército, Bloco B. Térreo QGEx SMU, BR-70630 Brasília.

La nur unujara klubo en Belo Horizonte, Disvastiga Esperanto-Grupo, raportas ke preskaŭ 150 homoj partoprenas ĝiajn kursojn. Unu el tiuj okazis ĉe la Pontifika Katolika Universitato de Minas Gerais, sub la aŭspicio de ties juralingva fakultato.

• **Bulgario:** En la ĉefurbo Sofio ekzistas 15 lokaj kluboj, por helpi kies agadon la Centra E-Domo de Kulturo komencis eldoni broŝurserion *Esperanta estrado*. En ĝi aperos tradukitaj kaj originalaj, presitaj kaj neaperintaj teatraĵetoj, skeĉoj, kantoj, humuraĵoj ktp. Kunlaboremuloj skribu al *Esperanta Estrado*, Pk. 45, BG-1090 Sofia.

Oni ankaŭ provas revivigi la iamajn E-elsendojn de Radio Sofia. Apogojn sendu al Radio Sofia, blvd. Dragan Cankov 4, BG-1000 Sofia.

• **Centrafrika Respubliko:** La 15-an de novembro en la ĉefurbo fondiĝis Bangia Esperanto-Klubo, kun provizora sidejo en la Junulara Domo de Fatima. La membroj varme deziras ĝemeliĝi kun eŭropaj kaj aziaj kluboj. Skribu p/a Luc Fendangai, BP 360, Bangui.

• **Ĉinio:** En Liŭĝoŭ fondiĝis "Internacia Informŝanĝa Centro" por stimuli la aplikadon de Esperanto en ekonomio, scienco, tekniko, komerco k.s. Skribu al la centro ĉe Yufeng-a Kesto, Liŭĝoŭ.

La revuo de la Ĉina Mikrokomputilista Asocio nun havas Esperantan titolon, *La mondo de la miniatura komputero*, dum dokumenta filmo *La antikva urbo Dali*, pri loko sur la Silka Vojo, estas nun spektebla ankaŭ en Esperanto.

• **Danlando:** La relative eta Esperanto-Unuiĝo de Naestved, en la kadro de siaj ĝemelaj rilatoj kun Afriko, gastigis junan togolandanon Ekue Foley por trimonata periodo post la roterdama UK. Temis ne nur pri kutima Esperanta agado – prelegoj, renkontiĝoj ktp – sed ankaŭ mallonga meti-praktika periodo kaj diversaj permanaj okupoj. Forvojaĝante, Foley donace ricevis VHS-vidbendon pri siaj travivaĵoj, kiu cetere mendeblas kontraŭ

200 danaj kronoj ĉe Georg Kustos, Stenbrydervej 6, Vaerløse, DK-4640 Fakse.

La sama grupo sukcesis, kunlabore kun la komunuma Kultura Konsilantaro, venigi la polan pupteatron "Rabcio" dum la aŭtunaj lerneĵferioj. La trupo prezentis Esperantajn dramojn al infana kaj plenkreskula publiko en kvin urboj.

Dum la printempa trimestro, prof. Henning Spang-Hanssen gvidas kurson pri "Internacia komunikado per planlingvoj" ĉe la Universitato de Kopenhago. Spang-Hanssen estas konata pledanto por pure teoria aliro al planlingvistiko, laŭ la tradicio de la dana strukturalismo; tamen sub lia gvido studento Jan Sosniecki preparas esperantologian disertacion. Oni kredas la kurson la unua pri interlingvistiko en Danlando.

• **Francio:** Por esti membro de la nove fondita Franca Komitato por la Apliko de Esperanto en Scienco, estas neniu kotizo sed devigo ĉiujare verki aŭ traduki almenaŭ 5-paĝan sciencon artikolon en Esperanto, prefere en prespreta formo. Pliajn informojn donas la provizora sekretario: Christian Bertin, 60 allée de la Renaudière, F-35510 Cesson-Sevigne.

• **Hungario:** Lokon en la publika vido HEA tenas diversmaniere. Ekzemple, ĝiaj oficistoj unusemajne tiris la lotojn por la Nacia Loterio; la 28-an de oktobro okazis 50-minuta programero pri Esperanto kadre de populara antaŭtagmeza elsendo.

• **Jugoslavio:** Dum decembro 1988, pli ol cent esperantistoj festis la 80-an datrevenon de la fondo de la unua klubo en Zagrebo, la 28-an de decembro 1908. Aperis speciala E-poŝtkarto, okazis programeroj por la lernantoj el la lernejoj kursoj, "renkontiĝo de ses generacioj", solena akademio kun transdono de literatura premio, kaj tribunoj por verkistoj kaj politikaj aktivuloj. La zagrebaj fervojistoj aldonis amuzan etoson per folkloro "verda vespero".

• **Koreio:** Aperis la tria numero de *Mondo de universitato*, organo de Esperanto-Instituto de Dankook-Universitato. Inter interesaj artikoloj pri edukado, terscienco, aideso, ekonomio kaj korea historio, ĝi donas novaĵojn pri la landa movado. Krom ties evidenta kresko, kiun spegulas kursoj, renkontiĝoj kaj kongresoj, notindas la uzo de Esperanto fare de turisma agentejo, i.a. por kontaktoj kun simila entrepreno en Ĉinio.

• **Pakistano:** Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) pasintjare decidis konstantigi la aperon de sia *Bulteno*, kiu prezentas la movadon kaj la landon al internacia legantaro. Abonpetojn, subtenon forme de libroj, revuoj, leteroj ktp, sendu al Esperanto Markaz, PO Kesto 535, Multan, Pakistano.

• **Svislando:** Svisgermanoj formas la plimulton en ĉi tiu kvarlingva lando, sed ilia varianto de la germana –



• **Portugalia:** En decembro Portugala Esperanto-Asocio partoprenis la 1-an Foiron de la Industrio kaj Kulturo en Lisbono. Vizitis la standon i.a. la ŝtata prezidento, d-ro Mário Soares, kadre de oficiala delegacio (maldekstre en la foto).

“ŝvicarduĉ” – ne estas instruata en lernejoj. Svisfrancoj, por kiuj la norma germana estas deviga studobjekto, nun ekribelas, demandante sin pri la senco lerni duan lingvon kiun oni eĉ ne parolas en Svislando. Opinisionoj montras, ke 65% preferus studi la anglan. El la svisgermanoj, kiuj devas lerni la francan sed malofte uzas ĝin, 58% preferus la anglan.

• **Togolando:** Ĉe la klubo “Juna Amikaro” en Aneho, marborda urbo apud la benina landlimo, kaj en la liceo de la apuda urbeto Aklakou funkcias ĉiusemajnaj kursoj – la licea kun 40 partoprenantoj. Ambaŭ serĉas alilandajn korespondantojn: “Juna Amikaro” ĉe s-ro Mensah B. Attiogbe-Agbemadon, CEG de Zalivé, BP 134, Aneho; “Unua Esperanto-Lernejo en Togolando” ĉe s-ro Afantchao Biakou Yao, Lycée Aklakou, BP 169, Aneho.

Fake

• **Fervojoj:** La redakcio de fervoja fakrevuo en Beogrado, Jugoslavio, publikigis dulingve ampleksan prelegon el la TEJO-kongreso en Zagrebo, fare de G. Sredić kaj D. Janičić. Separajo de la artikolo, kiu traktas i.a. la ekologian signifon de la fervojo, haveblas de la aŭtoroj ĉe ZJZ, Pf. 563, YU-11001 Beograd.

• **Homaj rajtoj:** TEJO kaj ILEI estis reprezentitaj ĉe internacia seminario pri “La rajtoj de la malfavoratoj” kaj, kune kun UEA, ĉe la ceremonio honore al la 40-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, ambaŭ decembre en Parizo.

Nederlandano Rob Keetlaer tradukis la artikolon de Ralph Harry kiu aperis en la oktobra numero de *Esperanto*, por homrajta numero de la bulteno de la Studenta Asocio pri Internaciaj Rilatoj en Amsterdamo.

• **Katolikoj:** Anoj de la Salazena ordeno planas 20 000-ekzempleran eldonon en Esperanto de la letero, kiun Papo Johano Paŭlo II sendis al la ĉefo de la ordeno okaze de la centjara datreveno de ĝia fondinto. Por informoj turnu vin al Pastro Petras Urbaitis, Lituanai di Don Bosco, Via Colonna 2, I-00044 Frascati RM, Italio.

• **Komputila instruado:** Komenca E-kurso taŭga por IBM-“PC”-kongruaj

komputiloj kun EGA/VGA ekranoj, celata specife por franclingvanoj, haveblas de Christian Bertin, 60 allée de la Renaudière, F-35510 Cesson-Sevigne, Francio.

Hungaraj fakuloj prezentis programojn por instrui Esperanton ĉe internacia konferenco pri perkomputila instruado de lingvoj, septembre en Budapeŝto.



Diversa uzo de Esperanto ilustras la pravon de la Goldman-a optimismo sur p. 29-30: malgrandaj sed realaj venkoj.

• **Medicino:** Laŭ interkonsento farita la 2-an de novembro 1988, Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) komencis neoficialajn rilatojn kun Monda San-Organizo en Ĝenevo. Interalie aperos rubriko pri MSO en *Medicina internacia revuo*, kaj okazos prelego pri la laboro de MSO ĉe la ĉi-jara 7-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco en Kortrijk, Belgio.

En novembro la Stomatologia Sekcio de UMEA okazigis kurson pri “Estetiko en stomatologio” en la brazila ĉefurbo Brazilio. Du mil reklamiloj pri la kurso estis dissenditaj al fakuloj.

Esperanta sekcio de la Monda Federacio de Kuracistoj Kiuj Respektas la Homan Vivon, 250 000-membra organizaĵo kiu varbas por la observo de la Ĵuro de Hipokrato kaj la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj fare de kuracistoj, estas la celo de ties ĝenerala sekretario, d-ro P. Schepers, Serruyslaan 76, B-8400 Oostende, Belgio. Jam haveblas de li konciza program-eseo, *La estonteco de la medicina profesio je la servo de la homo*.

• **Politiko:** “Esperanto” Radikala Asocio organizis du elsendojn pri Esperanto ĉe la itala radio, 15-minutan ĉe Radio Unu kaj unuhoran ĉe Radikala Radio. En ambaŭ, pluraj konataj italaj politikistoj deklaris sin favoraj al Esperanto.

• **Tradukado:** En la kongreslibro de la monda kongreso de la Internacia Federacio de Tradukistoj, eldonita en 1988, aperis anglalingva artikolo “Literatura tradukado el Esperanto” de W. A. Verloren van Themaat.

• **Turismo:** Oni ĝisdatigas la liston de turismaj prospektoj en Esperanto. Sendu ekzemplerojn al, petu informojn de C.M.J. Borremans, Niedersachsenweg 9A, D-2110 Buchholz 5, FR Germanio.

• **Verkistoj:** En la lasta teatra konkurso de Esperanta Verkista Asocio (EVA) partoprenis 15 teatraĵoj de 14 aŭtoroj el 10 landoj. La ĵurianoj de la konkurso baldaŭ diskonigos siajn decidojn. Intertempe ŝanĝiĝis adreso de la konkursa sekretario: Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio, tel. 041-429-251.

Persone

• **Einihovici:** Idyss Einihovici (Perto, Aŭstralio), post la forpaso de sia edzo d-ro Tim Einihovici lastan marton, fondis je lia memoro Junularan Esperantan Vojaĝo-Fonduson. Kontribuojn al la Fonduso, kiu financos la vojaĝon de almenaŭ unu juna aŭstraliano al la TEJO-kongreso ĉiujare, sendu al ŝi ĉe 88 Newry St., Floreat Park, WA 6014, Aŭstralio (tel. 09-387-2475).

• **Meier:** La 19-an de februaro 1989 Alice Meier (Brita Kolombio, Kanado) fariĝis centjara. Naskita en Belgio, ŝi lernis Esperanton en sia junaĝo kaj partoprenis jam la 8-an Universalan Kongreson en Krakovo. Dum la 15-a UK en Nurenbergo (1923) ŝi renkontis sian postan edzon, aŭstron Vilĉjo Meier; ili kune uzis kaj instruis Esperanton en Germanio kaj post la dua mondmilito en Kanado. Ankoraŭ en 1987 s-ino Meier povis partopreni la Jubilean UK en Varsovio. Onidire, la stabo de ŝia pensiulejo jam intense studis Esperanton cele al taŭge internacieca naskiĝfestoj. Gratulojn sendu al Alice Meier, 2 Page Drive, Galiano Island BC, Kanado V0N 1P0.

Anoncetoj

E-filatelaĵojn por somera ekspozicio deziras interŝanĝi Cao Xionglin, Ruzilu 25, hao Nanchang, Jiangxi-provinco, Ĉinio.

32-jara invalido volas korespondi kun la tuta mondo. Bogdan Chojecki, ul. Kolo-brzeńska 58E/32, PL-80-394 Gdańsk-Oliwa, Pollando.

Internaciajn kontaktojn, cele al realigo de regiona E-centro kaj ĵurnalisma-lerneja korespondaj retoj, serĉas Jurij Mylnikov, str. Ĉernyševskogo 16-3, u. Kotlas-11, SU-165411 reg. Arĥangelskaja, Sovetunio.

Mi aĉetas la librojn *Homarisma laboro* (Sturmer), *Vol. II* (Robinson), *Modernaj Robinzonoj* (Schwartz), *La maja festo* (Flamo), *La urbestro de Zalamea* (Calderon), *La morto de Blanjo* (Tousseul). Osmo Buller, PL 272, SF-90101 Oulu, Finnlando.

Duala Esperantista Grupo havas novan adreson: B.P. 6154, New Bell, Douala, Kamerunio, kaj serĉas korespondantojn por siaj 8 finlernintoj (aĝoj 18 ĝis 40), kaj krome petas helpon: libroj, revuoj k.a. esperantaĵoj. Dankon!

“Kor. dez.!” Nova adreso. S-ino Astrid (Teuk) Nilsson, Rödevägen 8, 820 77 Gnarp, Svedujo.

Ekde marto ni transloĝiĝos al la kamparo. Jen do nia nova adreso: Ĵak kaj Armelle Le Puil, Lieu-dit “Les Cocherats”, Thaumiers, 18210 Charenton-du-Cher, Francio, tel. 48 61 81 98.

Nia regiona kongreso okazos la 27-28an de majo 1989 apud Lago Biwako, la plej granda lago japana, subteme “Akvo, Verdo kaj Esperanto”. Atendas vian partoprenon aŭ kontribuon sendi mesaĝon pri la temo, la 37a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, ĉe s-ino MURATA Takako, Oiwake-tyô 12-22, Ôtu-si, 520 Japanio.

Novaj esperantistoj dezirus korespondi kun tuta mondo pri diversaj temoj; la adreso de la grupgvidanto – Dimitrij Cibulevskij, SU-310024 Harkov, Ĉajkovskogo 25, kv. 11, Ukraino, USSR.

Zhou Zhigi, ĝenerala sekretario de Chang sha—a Esperanta Filatelisto-Ligo, deziras interŝanĝi E-librojn, E-gazetojn, E-insignojn, ĉefe E-filatelaĵojn (pm, utk, stampiloj ktp). Adreso: 2 lian shengjie, Changsha, Hunan, Ĉinio.

10-jara Esperanto-lernantino, kiu ludas pianon, interesiĝas pri muziko kaj ŝatas legi, deziras korespondi kun samaĝulinoj el la tuta mondo pri ĉiuj temoj: Hélène Houguet, 13 rue du Pradonnais, F-44350 Guerande, Francio.

30-jara litova ĵurnalisto serĉas korespondgeamikojn por diversstema korespondado. Respondo certa. Laimius Stražnickas, P.O. Box 1469, 232040 Vilnius-40, Litovio (USSR).

Rikolto en preparo. Okaze de la 75-jariĝo de Prof. D-ro Juan Régulo Pérez en Marto 1989, la brazila eldonisto Gersi Alfredo Bays decidis eldoni la kolekton de la Esperantaj artikoloj de Régulo sub la titolo *Rikolto* – projekto iam antaŭvidita en la Stafeto-serioj. Editoroj de la ampleksa volumo estas Reto Rossetti kaj Reinhard Haupenthal. Enkondukon verkos Prof. Gaston Waringhien. Ĉar bibliografiaj antaŭlaboroj ne ekzistas (la Bibliografio en *Serta I* estas tre nekompleta pri Esperanto) necesas traserĉi multajn librojn kaj revuojn. Por faciligi tiun laboron kaj por eviti mankojn la teknika redaktoro (R. Haupenthal, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt) petas pri atentigoj al artikoloj de Régulo.

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Britio: William Vincent. Finnlando: S.S. Mynttinen. Francio: C. Dugrain. Japanio: H. Kanou; Ejko Abe. Jugoslavio: J. Židanik. Kanado: C.M.-M. Campagna; N. Fleury. Nederlando: F. Nikolov. Svislando: Sonja Brun. NOVA DUMVIVA MEMBRO KUN JARLIBRO: Nederlando: J. Nikolov-Hoitsma. Aktuala nombro: 954.

DONACOJ 1988

ĝis la 31-a de decembro

FONDAĴO AFRIKO: Japanio: Anonime 500,00. Meksikio: E. Mustea 100,00. Nederlando: K.A. Riemersma 15,00; I. M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; Instruista Konferenco ILEI 200,00; S.A.K. v.d. Zee 125,00. W. Akkerman 35,00. Usono: D. Roff 10,00; Esp. Societo Chicago 102,41. Sumo en 1988: 10 480,90.

FONDAĴO AZIO: Meksikio: E. Mustea 50,00. Nederlando: S.A.K. v.d. Zee 125,00. Sumo en 1988: 1305,92.

FONDAĴO CANUTO: Meksikio: E. Mustea 50,00. Nederlando: R. Slot 200,00; S.A.K. v.d. Zee 125,00. Svedio: U. Luin 101,00. Sumo en 1988: 1778,76.

Tartua Esperanto-Societo (str. Riia 37, SU-202400 Tartu, Sovetunio) serĉas partneron por fondi komunan ofsetan presejon en Estonio. Ni disponas je papero, ejoj, laboristoj kaj merkato, sed bezonas taŭgajn aparatojn.

25-jara kuiristo dez. kor. kun Oceanio pri kuirarto kaj manĝaĵoj. Adreso: S-ro Wang Huai Yu, No. 9, 17-Li, Section 2, St Guilin, District Heping, Shenyang, 110002, Ĉinio.

Rondo Kato 3-jara. Ni estas 10 personoj el diversaj landoj, posedante divers-rasajn katojn, korespondante, interŝanĝante katbildojn. Nun nia agado vastiĝas: Mi peras esperantlingvajn svedajn katajn poŝtkartojn por niaj amikoj. Mi povas ankaŭ peri diversajn aliajn varetojn por niaj rondanoj, interesajn aŭ bezonatajn por katzorgo. Pagu aŭ rekompencu per ŝanĝebla valuto, internaciaj respondkuponoj aŭ esperantaĵoj. Rondo Kato, Pentti Törmälä, Kirkkokatu 9, SF-06700 Porvoo, Finnlando.

Ĉiam konstante akceptas korespondopropojn kun japanoj, Japana Esperanto-Korespondo-Servo de KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO: Finnlando: gratule al Rob kaj Nora 50,00. Sumo en 1988: 60,00.

ĜENERALA KASO: Belgio: E. Ernst 500,00. Britio: C.A. Field 18,15; M. Tresidder 10,83; A.R. Person 10,80; E.A. Fairbairn 108,52. Finnlando: M. Tähkävuori 160,00. Irano: M.H. Saheb-Zamani 500,00. Japanio: T. Yamada 80,00; S. Ito 80,00; T. Nisikawa 615. Nederlando: Merkurio 200,00; R. Slot 21,51; S.A.K. v.d. Zee 125,00; P. Tensen 13,00; G.F. Makkink 1000,00; L. Adelaar 200,00. Svedio: honore al E. Carlén 3820,55. Svislando: Parzival 25,05; W. Schaufelberger 26,71; H. de Sassi-Reber 12,02. Diversaj malgrandaj 8,87. Sumo en 1988: 15 922,14.

ASOCIA KAPITALO: Britio: J. Brownlee 3617,50. Jugoslavio: memore al Zofija Židanik 7491,00. Sumo en 1988: 11 293,84.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Meksikio: E. Mustea 50,00. Sumo en 1988: 162,50.

ESPERANTO-CENTRO BJALISTOKO: Britio: E. Semaska 50,00. Francio: R. Perault 74,99; G. Gerrier 32,91. Norvegio: K. Gustavsen 150,00. Diversaj malgrandaj 33,55. Sumo en 1988: 11 144,67.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

TOMBOŝTONO POR IVO LAPENNA

Por digne honori al Prof. D-ro Ivo Lapenna ni deziras starigi belegan tomboŝtonon kun reliefo de li en bronzo. La kostoj estas altaj, kaj se ankaŭ vi deziras honori al Ivo Lapenna, vi povas sendi vian kontribuon al "Fondaĵo Ivo Lapenna", S-ro Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, ĝirkonto 1 19 06 01.

unika kolekto de referaĵoj el la samnoma simpozio okazinta en 1987

SOCIAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

ideologiaj, historiaj, sociologiaj, soci-politikaj aspektoj

21 kontribuoj de renomaj aŭtoroj

redaktis Senad Colic

140 pĝ. 21 cm 20.– gld.

eldonis: elbih, V. Pelagica 8/I,
74000 Sarajevo, Jugoslavio

"Stafeto"-serio prezentas:

NIGRA MAGIO

Deck Dorval

Dum ŝtorma, pluvplena vespero aŭto paneas. Sinjorino Barnaŝ, klarvidantino, unu el la kvar pasaĝeroj eksentas la ĉirkaŭeston de malbonaj spiritoj... Jen la scenaro por enigmo solvenda de inspektoro Ksaverio Kant en tria parto de la sukcesplena detektivserio.

Nigra magio. 216 paĝoj, 522 bfr. aŭ 24,30 gld. + sendokostoj. Bindita. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

Nova legolibro por progresantoj:

LA LAŬTA VEKHORLOĜO

. . . kaj aliaj atento-kaptiloj

de Stefan MacGill

Kvar humuraj rakontoj, la unua simpla, la postaj ne tro malsimplaj, kun abundaj demandoj, ekzercoj, enigmoj kaj eĉ konkursoj. Taŭga por aktiviga uzo en kursoj kaj por mem-studentoj. Kun ok rol-ludoj, vortlistoj kaj notoj por instruistoj. Ilustrita de Pavel Rak. 200 paĝoj. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio. Prezo ĉe UEA: 21,00 gld.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 68 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorcenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 19,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

(43 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (TO), Italio

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA
CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS (Svislando)

atendas vin la tutan jaron. Entuziasmiga esperanto-vivo, variaj manĝoj, komfortaj ĉambroj, saniga vivo en la montaro.

Venontaj esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj: 20-25 marto, 24-29 aprilo, 22-27 majo, 19-24 julio, ĉiusemajne ekde la 10-a de julio ĝis la 12-a de aŭgusto, 18-23 septembro ktp.

Aliaj aranĝoj: 25-27 marto: La montaro Ĵuraso ekprintempe, kun C. Gacond. 3-8 aprilo: Intensiva pretiĝo al trapaso de esperanto-ekzamenoj, kun C. Gacond, F. Degoul kaj S. MacGill. 6-7 aprilo: Esperanto-ekzamenoj laŭ la normoj de UEA-ILEI. 13-15 majo: Studa semajnfino pri arbaro, kun J. Pachter. 15-20 majo: Seminario pri la nomoj de sovaĝaj plantoj, kun B. Eichkorn kaj R. Bossong. 10-22 julio: Intensiva pedagogia-metodika kurso, kun I. Szanser. Ekde la 17-a de julio ĝis la mezo de septembro: Tre riĉa kurs-programo. Petu la detalan informilon.

“Stafeto”-serio prezentas:

Dirdri
kaj la filoj de Usnaĥ

Adriaan Roland Holst

Mallonga romano inspirita de keltaj elementoj, kiu disvolviĝas en Irlando.

Ĝi estas perleto sur la krono de la nederlanda literaturo, majstre tradukita de Christian Declerck.

Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ. 52 paĝoj, 198 bfr./10,80 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

Post plurjara nehaveblo
reaperis ĉe UEA la (fi)fama

EL LA VIVO DE
BERVALA SENTAŬGULO

maldeceta epizodaro

de

Louis Beaucaire

Ne nur senkompare sprita, sed eduka por ĉiu ano
de la Esperanta kulturo! Lernu i.a.


- * la kromsignifon de “esperanti”
- * la sekretan historion de UEA kaj SAT
- * la nuancplenan uzon de la tuta glosaro
de *Libro de amo*

Mendu de la Libroservo de UEA: 15,00 gld.

Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

La Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj prezentas la

2-an Kulturaran Seminarion por Esperantistoj



Jen diroj de lastjaraj partoprenantoj:

“La instruistoj elradiis trankvilecon, kiu donis al ili specialan belecon kaj helpis al ni ne perdi la kuraĝon, kiam ni kelkfoje sentis nin nekapablaj aŭ iom lacaj.”

— Märtha ANDRÉASSON, Svedio

“Dufoje jam mi vizitis Japanion kiel turisto, kaj vidis ĝin de ekstere. Nun mi vidas ĝin de interne, marŝante sur getaoj, trinkante verdan teon, lernante pri kaligrafio, ktp.”

— Loes DEMMENDAAL, Nederlando

Ĉi tiu intensa 3-semajna seminario donos unikan okazon al maksimume 8 esperantistoj trempiĝi en la japana kulturo, lernante tradiciajn artojn en taŭga medio, en la gubernio Kioto, kie naskiĝis kaj evoluis multaj el tiuj artoj.

Partoprenantoj lernos per efektiva faro kaligrafion, nandan, te-ceremonion, ceramikon, kaj Oomoto-budoon (devenan el batalartoj). Oni ricevos ankaŭ enkondukon al aliaj japanaj artoj, inkluzive de floraranĝado, akupunkturo, meditado, kaj muziko.

Datoj: 1989 septembro 10-30

Tuta kosto (inkluzive manĝojn kaj loĝon): \$1400 usonaj

Petu aliĝilon kaj detalan informon de:

Internacia Fakoj, Oomoto
Kameoka-ŝi, Kioto-hu, Japanio 621

Ĉar ni povas akcepti nur 8 personojn, indas frue aliĝi!